HUNGARA VIVO

6
1980
11,—Ft

HERBARIA

Landa Kuracherbo–Komerca Komuna Entrepreno

La novaĵo HARALKOHOLO BÁNFI malpliigas defalon,

pliigas kreskadon de haroj!

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Eeperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H—1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 6
(94)

ENHAVO

Verzár, I.: Kiel vojaĝi en Hungario? — — — — — — — — 202
Fejes, M.: Jubileas Hungara Baroka Triopo — — — — — — — 203
László, I.: Internaciaj konkursoj di dirigentoj en Hungario — 204
Kapitány, L.: Pri la hungara medikamento-industrio — — — 206
Por pli efika nacilingva informado *(-czik)* — — — — — — 207
Nagy, L.: Absurda biontologio *(I. Takács)* — — — — — — 208
Golden, B.: Rabindranath Tagore kaj Esperanto — — — — — 209
Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 18. — — — — — 210
Tordai, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 10. (P. A. R.) 212
Szabó, L.: Poliartrito *(I. Szabó)* — 123
Marosán, Gy.: Vastiĝantaj ebloj de la malvastiĝanta mondo *(I. Verzár)* — — — — — — 214
Vihar, B.: Preĝo *(V. Benczik)* — 215
Szabó, I.: Junularo kaj futuro — 217
Gergely, M.: Talenta fabelistino 219
Panoramo — — — — — — — — 220
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj — 223
Rados, P. A.: „Mi, ribela, Liberon deziras . . .” — — — — — 224
D-ro László, F.: Budapeŝto, la urbo de banejoj VI. *(E. Fenyvesi)* — — — — — — — — 226
Ŝomuĥamedov, Ŝ.: Verse pri medicino — — — — — — — — 234
Knichal, O.: Konsoli aŭ stimuli? 234
Mihalkov, G.: Juhan Liiv ravis min — — — — — — — — 235
E. F.: Gaja paĝo — — — — — 236
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko — — — — — — — — — 236
Esperantaj libroj el Hungario — 237
Leterkesto, Korespondi deziras — 240

Sur la titolpaĝo: du junaj legantinoj en la E-biblioteko de Károly Fajszi. (Foto de Zoltán Fejér)

La frontpaga foto...

deziras memorigi Vin, Kara Leganto, pri tio, ke libroaĉetado eblas ne nur en decembro, sed dum la tuta jaro. Kaj se la surfote videblaj riĉa Esperanta libraro kaj la du ĉarmaj fraŭlinoj emigis Vin al aĉeto, sur la lastaj paĝoj de tiu ĉi numero Vi trovas mini-katalogon de la ĉefaj eldonaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio, kaj tiu katalogo espereble firmigos Vian aĉetemon. Cetere „kulpas” tiu katalogo, ke ankaŭ en tiu ĉi numero mankas krucenigmo, kaj eĉ la kutima „Paĝo de komencantoj”.

Tamen ne la tuta numero estas dediĉita nur al libroj. Kiu planas turisman vojaĝon al Hungario, tiu povos bone utiligi la informan artikolon pri IBUSZ, la plej prestiĝa hungara vojaĝagentejo. Pri interesa konkurso raportas István *László*, pri *internacia konkurso de dirigentoj*, organizita de la Hungara Televido, dum Lajos *Kapitány* artikolas pri la hungara medikament-industrio. Bernard *Golden* klarigas pri la rilato de *Tagore* al Esperanto, P. A. *Rados* ekzamenas interesan aspekton de la Esperanta poezio. Per mallonga artikolo ni rememoras la 1000-an datrevenon de la fama sciencisto *Ibn Sina* (Avicenna), kaj por niaj novaj legantoj denove ni prezentas la hungarlingvajn eldonaĵojn de HEA: la revuon *Világ és Nyelv* kaj ties almanakojn. El la lasta almanako ni ĉerpis unu el la — malmultaj — literaturaĵoj de tiu ĉi numero, la poemon de Béla *Vihar*. Alian kordon sonigas la *Absurda biontologio* de Lajos *Nagy*, pri kies rolo en la hungara literaturo informas la ĉi-numera daŭrigo de la serio „Jarcentoj de la hungara literaturo”. Kaj nia alia serio, „Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo”, startinta antaŭ tri jaroj, en tiu ĉi numero finiĝas. La aŭtoro, la tradukintino kaj nia tuta Redakcio esperas, ke ĝi sukcesis iom proksimigi nian landon al la multnacia legantaro de HV.

La artikolo de Imre *Szabó* pri la hungara junulara Esperanto-movado troviĝas meze de tiu ĉi numero, tamen mi mencias ĝin laste, por doni nepre optimisman finon al tiu ĉi enkonduko, precipe, ĉar per tiu ĉi numero finiĝas ankaŭ la dudeka jarkolekto de nia revuo. La vasteco de la agado de la junaj hungaraj esperantistoj donas vere firman bazon por optimismo, kaj espereble tiu optimismo forblovos vian koleron pro la tre malfrua ricevo de tiu ĉi numero. Ni faros nian eblon nepre likvidi la malfruan aperadon de HV dum la nova, jam komenciĝinta jaro 1981.

Kiel vojagi en Hungario?

La fremdultrafiko en la mondo ludas grandan rolon en la ekkono de diversaj kulturoj. En la modernaj tempoj, dank' al la evoluo de la tekniko, la mondo ŝrumpas: dum kelkaj horoj oni povas alveni kien ajn, eĉ en la plej kaŝita parto de nia bela globo. Do, la vojaĝo, antaŭe luksa esceptaĵo, iĝis iom post iom manio, poste bezono. Kaj bezono estas la plej forta ordono. Ordono de la moderna vivo de la malkovrema homo, kiu volas scii, kiel oni vivas en aliaj kontinentoj, en aliaj landoj, eĉ se tiu ĉi

lando apartenas al alia politika sistemo... Konklude, ni kredas, ke ne estos superflue, se ni provas informi Vin, Kara Leganto, pri eblecoj de vojaĝoj en Hungario.

En nia lando ekzistas pluraj ŝtataj vojaĝoficejoj. Kelkaj estas malnovaj, kelkaj fondiĝis en la lastaj jaroj. Unu

fondiĝis tiucele, ke la junularo havu propran vojaĝoficejon, alia estiĝis en kadro kooperativa k. t. p. Ili ĉiuj organizas diversajn vojaĝojn, programojn por la vizitantoj de nia lando.

Unu el ili estas la plej granda vojaĝoficejo, preskaŭ monopola en la metio ĝis la fino de sesdekaj jaroj, IBUSZ, Entrepreno de Fremdultrafiko, Akirado, Vojaĝo kaj Transporto, fondita en 1902, kiel la tria inter la vojaĝoficejoj de la mondo. Kompreneble tiu ĉi oficejo estas tre sperta kaj tre aktiva, laboras elaste kaj rapide. Ĝi estas la sola, kiu jam ekzistis antaŭ la dua mondmilito, havis kaj evidente havas oficejojn kaj reprezentantojn en eksterlando. Ĝi funkciigas proksimume 80 oficejojn en Budapeŝto kaj en grandaj urboj de Hungarujo. Malgraŭ la fakto, ke ĝi ne posedas hotelojn kiel la *Inturist* en Sovetunio, *Ĉedok* en Ĉeĥoslovakio k. t. p., ĝi garantias loĝejojn de ĉiaj kategorioj, havante grandajn kontingentojn en la hungaraj hoteloj — kiuj pretere, apartenas al tri ŝtatentreprenoj, *Hungarhotels*, *Danubius* kaj *Pannonia*.

IBUSZ, kiel ni jam diris, havas oficejojn kaj reprezentantojn en eksterlando. Ili faciligas la laboron de la centra oficejo, kiu direktas ilian funkciadon. La reprezentantoj en Beogrado, Bruselo, Madrido, Moskvo, Nov-Jorko, Parizo, Romo, Tokio kaj Varsovio vidas nur tiun celon antaŭ si, ke, mezurante la eblojn de la merkato en la koncerna lando, ili faru kiel eble plej grandan kaj intensan propagandon pri Hungario kaj ĝiaj vidindaĵoj. Ili havas bonajn kontaktojn kun la tiulandaj vojaĝoficejoj, distribuas kaj eldonas diversajn elegantajn prospektojn, partoprenas en ĉiuj ekspozicioj kaj foiroj, kiuj povas kontribui por la pliigo de la aktiva fremdultrafiko en Hungario. En tiuj ĉi oficejoj oni povas akiri ĉiujn informojn koncerne vojaĝformalaĵojn (pasportajn kaj vizajn, se oni bezonas ĝin), eblojn de monŝanĝo, de aĉetado en Hungario kaj de diversaj ekskursoj organizataj, la plej belajn vojplanojn, kiujn oni povas elekti dum vojaĝo en nia lando, fine koncerne prezojn de diversaj tranoktejoj (hoteloj, moteloj, kampadejoj kaj privataj loĝejoj). Oni povas informiĝi en tiuj ĉi reprezentejoj ankaŭ pri la modoj de rezervado de ĉambro en hotelo, pri horaroj de trajnoj, aviadiloj ŝipoj k. t. p.

La oficejoj de IBUSZ havas komercajn rajtojn, laboras kiel vojaĝoficejoj de tiu lando, kie ili funkcias. Ili estas „tour operators" kolektantaj vojaĝanonciĝojn ĉe diversaj tiel nomataj „revendantaj" oficejoj. En Berlino, Frankfurto, Kolonjo, Londono (ĝia nomo estas „Danube Travel"), Prago, Stokholmo kaj Vieno tiuj ĉi oficejoj, tre bone instalitaj kaj havantaj specialistan personaron, povas kontentigi dezirojn kaj bezonojn de ĉiuj, kiuj intencas pasigi sian libertempon en Hungario. Aĉeti en tiuj ĉi oficejoj tutajn vojaĝojn kaj biletojn surbaze de iliaj prospektoj, ne signifas grandajn malfacilaĵojn...

...Kaj estas tre grave, ke oni elektu vojaĝoficejon, kiu konas vere la cellandon, kiel *Generalturist* Jugoslavion, *Scanditours* Skandinavion, *Meliá* Hispanion aŭ... IBUSZ Hungarujon. Kial? Ĉar Vi devas supozi, kiel multe povas objektive kompreni tutajn landojn oficistinoj de diversaj vojaĝoficejoj, kiuj vendas vojaĝojn al kvin kontinentoj! Ĉu estas eble scii ĉiujn horarojn, prezojn, koni malsamajn kutimojn, hotelkvalitojn, interesajn monumentojn kaj tiel plu? Nature ne! Oni postulus tro multe...

IBUSZ konas Hungarion kaj ĉiuj oficistinoj povas informi Vin kun la pleja detaleco. Kaj tiu ĉi estas la garantiaĵo de la „akcepta turismo". Turismo en plena evoluo, kun multaj novaj hoteloj, restoracioj, modernaj ŝoseoj, kiuj Vin kondukas al lago Balaton aŭ al la interesaj kaj belaj urboj de nia malgranda, sed gastama lando.

István *Verzár*

Jubileas Hungara Baroka Triopo

Muzikon de malnovaj epokoj — por moderna homo

„Por la 300-jara naskiĝjubileo de Georg Telemann, la Muzikverk-Eldonejo en 1981 aperigos diskon kun liaj elektitaj verkoj en prezento far Hungara Baroka Triopo."

(gazetara sciigo)

Baldaŭ post apero de la supra, ĝojiga por muzikamantoj informo estis publikigita alia sciigo: Sin preparanta por jubileo de Telemann, la Hungara Baroka Triopo donas koncerton en Budapeŝta Kultura Centro de GDR. Tiel do ligiĝas du jubileoj, ja mem la interpretanta triopo fondiĝis antaŭ dek jaroj, en 1970.

De maldekstre—dekstren: Gyula Csetényi, Csaba Végvári kaj Zsolt Bartha okaze de Telemann-vespero. Foto: Jakab Regös

Junaj profesoroj

Iniciatanto kaj nuna arta gvidanto de la Triopo estas Gyula Csetényi flotartisto, profesoro de Budapeŝta Muzika Akademio „Ferenc Liszt." La saman Akademion li finis en 1966, poste li studis en Salzburga Mozarteum kaj laboris kiel aspiranto ĉe Akademio Mendelsohn en Leipzig. Li estas konata ankaŭ kiel solisto. Realveninte hejmen li organizis Hungaran Barokan Triopon por tiu celo, ke per la plej konvenaj muzikinstrumentoj (floto-violoncelo-ĉembalo) ili konatigu unuavice malpli konatajn artverkojn de riĉa baroka literaturo, sed ili celis ankaŭ prezenton de nuntempa ĉambro-muziko.

Csaba Végvári ĉembalartisto ankaŭ profesoras ĉe la sama Muzika Akademio, kiun li finis en 1971. Li studis ankaŭ en Weimar. Zsolt Bartha estas la tria membro de la triopo, li estas violonĉelo-artisto, kaj laboras kiel solisto en la Nacia Filharmonio. Fakte li instruas en nenia lernejo, tamen ankaŭ li profesoras en la kampo de disvastigo de muzika kulturo.

De tempo al tempo el la triopo fariĝas kvaropo, se prezento de la verkoj bezonas ankaŭ kantiston. El tiuj porokazaj kunlaborantoj menciindas faqottisto László Hara, kiu kontribuis ankaŭ al ilia disko, aperinta pasintjare el verkoj de Vivaldi, Zachow, ktp. Sed ĝis tiam la vojo estis longa.

Laboro, sukcesoj

Multe da laboro sin kaŝas en iliaj sukcesoj. Krom la ĉiutaga instruado, respektive koncertoj ĉe Ŝtata Filharmonio ili ofte muzikas en Hungara Radio kaj Televido, regule ili gvidas muzikan tendaron somere en la pitoreska apuddanuba urbo Baja, ili kontribuas al someraj kulturaj aranĝaĵoj de Balatonregiono, ankaŭ eksterlande ili provas revivigi, resonigi kaj disvastigi la barokan muzikon. Ili gastrolis jam en Ĉehoslovakio, Francio, FRG, en Hispanio, Norvegio kaj Pollando.

La Triopo okupiĝas tamen ne ekskluzive pri muziko de baroko. En ilia repertuaro apud J. S. Bach, Händel, Telemann, Vivaldi, Boismortier, Purcell, Podbielski kaj Szarzynski troviĝas ankaŭ nuntempaj hungaraj komponistoj, kiel ekzemple Farkas, Kocsár, Madarász kaj Szokolay.

El ili I. Madarász speciale por ili komponis la verkon: „Paralelaj monologoj", Ottó Szokolay — aŭtoro de pluraj novaj operoj — la muzikverkon: „Jeremiado".

Ilia programo estas plenŝtopita ankaŭ nune. Ili sin preparas al Jugoslavia koncert-serio aranĝita enkadre de UNESKO-programo, sed oni atendas ilin ankaŭ al Pollandaj fortikaĵaj koncertoj kaj en Francion.

Interpretante Tut-Eŭropan programon ili reprezentas ankaŭ la hungaran muzikan kulturon. Ni deziras al ili pluajn sukcesojn.

M. *Fejes*

Internaciaj konkursoj de dirigentoj en Hungario

Eble sonas strange: konkurso de dirigentoj, ja ni alkutimiĝis al tio, ke ni renkontas konkuron ĉefe en la sporta mondo, sed dirigento estas rolanto de la muzika mondo. Do, ĝenerale oni povas konkursi ankaŭ en la muzikarto? Jes, kaj tiu konkurso estas multe pli varia, ĝi havas multe pli da aspektoj, ol tiu, kiun partoprenas konkursantoj de iu sportobranĉo. Ja, tie oni komparas rezultojn mezureblajn per teknikaj iloj, sed ĉi tie oni devas decidi sur tereno artisma, kiu prezentas muzikverkon pli bele, kiu povas plie alproksimigi la imagadon de la komponisto per sia arta interpreto, kiu povas instigi al pli altnivela arta prezentado tiun ensemblon, kies direktadon li entreprenis.

Eble mi ne enuigas la afablan leganton, se mi mencias, ke en la hungara lingvouzo la koncepto de la vorto „konkurso" ne estas fremda al muzikaj konceptoj. Ne nur pro tio, ĉar oni jam delonge aranĝas konkursojn por muzikartistoj (violonistoj, fortepianartistoj, ktp.) en Hungario, sed ankaŭ pro tio, ĉar se la hungaran ekvivalenton de la internacie konata vorto „koncerto" ni tradukas laŭvorte en fremdan lingvon, la rezultato estos la jena: „tonkonkurso". Kaj se ni jam parolas pri la „konkurso de tonoj", estas evidente, ke ni eĉ pli facile povas paroli pri la konkurso de tiuj artistoj, kiuj per la formado kaj harmoniigo de la muzikaj tonoj ĝuigas la aŭskultantaron.

La venkinto en la ĉijara konkurso de dirigentoj estis Gerald Hubertus Marinus Oskamp.

La konkurso havis partoprenantojn ankaŭ el ekstereŭropaj landoj. Sur la bildo: Victor Bolarinva (Nigerio) dum la provoj.

Propre, kio estas la tasko de dirigento? Direktado de la ensemblo dum la prezentado kaj dum la preparaj provoj. Ja, la publiko — dum la prezentado kaj en „viva" formo, kaj pere de radio, resp. televido — vidas kaj aŭdas nur tion, kio dum la prezentado vere okazas. Sed nur tre malofte estas videblaj kaj aŭdeblaj la provo, la preparĝo, kiuj antaŭas la prezentadon kaj kie la tuta artisma plenumaĵo propre formiĝas, perfektiĝas.

Vizitantoj de koncertoj bone konas tiujn strecajn momentojn de la atendado, kiam la frake vestita dirigento aperas antaŭ la orkestro, etendas sian manon al la koncertmajstro (t. e. la solisto de la unuaj violonistoj) trarigardas atente la tutan ensemblon, poste lia mano leviĝas kun la taktbastono, kaj je lia mangesto eksonas la muziko.

Kion signifas do la agado de dirigento, la direktado? Antaŭ longaj jarcentoj oni deziris de dirigento nenion alian, ol ke li direktu la ritmon de la verko, kaj mansignu la enpaŝon de la diversaj voĉoj. Depost preskaŭ pli ol unu jarcento la taskaro de la dirigento plilarĝiĝis, li devas analizi kaj realigi la skribe ne fiksitajn intencojn de la komponisto. Per tio la moderna dirigento paŝis en la vicon de la interpret-artistoj, kio signifas: per la direktata ensemblo li interpretas la pensojn de la komponisto por la aŭskultantoj.

Baze de la ĉi tie diritaj, certe estas kompreneble, kio estas la signifo de la konkursoj de dirigentoj. Nu, tiuj konkursoj proponas bonan eblon por tio, ke ne nur la fakuloj, sed ankaŭ la vizitantoj de koncertoj ekkonu la metiejsekretojn de la koncertoj, kaj per tio ili povu prijuĝi, kiom da arta penado, pedagogia kaj organiza laboro kaŝiĝas malantaŭ la muzikado, eksonanta kaj signifanta artan travivaĵon en la koncertejo.

La Hungara Televido en la jaro 1980 aranĝis jam triafoje la internacian konkurson de junaj dirigentoj. (La antaŭaj okazis en 1974 kaj 1977.) Tiuj Budapeŝtaj konkursoj — surbaze de la spertoj de la antaŭaj konkursoj — havas jam artisman rangon, ne nur en Eŭropo, sed eĉ en pli vasta rondo, ja ankaŭ el Usono kaj Japanio troviĝis konkursantoj. La konkurso estas konvena okazo por tio, ke la publiko ekatentu pri kelkaj elstaraj talentuloj, kaj helpu ilian evoluon, artistan disvolviĝon.

Kiel do aspektis tiu konkurso?

La komenca etapo okazis en provinca urbo, kunlabore kun la loka simfonia orkestro. Ĉiu kandidato devis instrui, resp. prezenti parton el klasika verko, maksimume dum 12 minutoj. El la 41-membra komenca partoprenantaro la internacia ĵurio elektis 16 kandidatojn, kiujn ĝi konsideris indaj partopreni la sekvan etapon de la konkurso. Poste la scenejo de la konkurso translokiĝis al Budapeŝto, kaj tie la kandidatoj devis solvi similan taskon, kunlabore kun la Ŝtata Koncertorkestro, dum la tempodaŭro de 20 minutoj. En ĉi tiu „antaŭfinalo" la ĵurio permesis al 9 personoj la daŭrigon de la konkurso.

Post mallonga paŭzo sekvis la meza etapo, kie la postuloj plialtiĝis. La kandidatoj devis direkti la prezentadon de kelkaj operpartoj, kunlabore kun solkantistoj kaj orkestro de la Operteatro kaj ankaŭ prezenti fragmenton de simfonia verko. La prezentotan verkon la kandidatoj ricevis per lotado. Por kunlabori kun la solkantistoj, la konkursantoj ricevis eblon nur helpe de fortepianisto. Ĉi tiun etapon de la konkurso finis bonrezulte ses junaj dirigentoj.

En la finalo la ses kandidatoj denove devis solvi novan taskon, kaj tio decidis, kiuj estas tiuj tri dirigentoj, kiuj meritas la premiojn, oferitajn de la Hungara Televido. Ili devis prezenti preskribe difinitan verkon, kunlabore kun la orkestro de la Radio. Tiun verkon la Hungara Televido verkigis por ĉi tiu okazo per hungara komponisto. La partituron* de la verko la konkursantoj ricevis 48 horojn antaŭ la prezentado kaj por orkestra ekzercado ili disponis nur pri 30 minutoj. Tielsame deviga materialo estis la konata verko de Béla Bartók: „Koncerto", kies prezento-

tan parton la ĵurio difinis rekte antaŭ la prezentado.

Krom la poentado far la ĵurio, ankaŭ la membroj de la kunlaborintaj orkestroj donis poentojn. En la finalo la anoj de la provincaj orkestroj per voĉdono kontribuis al la laboro de la ĵurio. Ili devis decidi pri tio, kiu estas la plej bona el inter la ses kandidatoj. Ilia voĉdono samtempe signifis inviton de la favorata dirigento al koncerto, aranĝota en la jaro 1981.

Ĉar la organizinto kaj mastro de la konkurso estis la Hungara Televido, eble estas memkompreneble, ke ĝi certigis vastan publikecon por la tuta aranĝo. Tio signifis, ke post la komenca etapo ĉiuj detaloj de la konkurso okazis antaŭ la televida publiko.

Tiel ni — iom troige — povas diri, ke la konkurso de la Hungara Televido iasence fariĝis propra afero de la tuta muzikamanta publiko de la lando.

La membroj de la internacia ĵurio estis reputaciaj dirigentoj, ĵurnalistoj, kritikistoj, membroj de eminentaj orkestroj, el preskaŭ ciuj landoj de Eŭropo. En la voĉdonado por decidi pri la sorto de la krompremio de la publiko, la spektantoj havis eblon partopreni, kaj telefone, kaj persone.

La fina fazo de la konkurso estis solena koncert-vespero en la Ŝtata Operteatro. Tie oni transdonis la premiojn por la tri plej eminentaj dirigentoj, kaj la krompremiojn. Poste ĉiuj el la premiitaj dirigentoj prezentis klasikan verkon, kunlabore kun la Filharmonia Orkestro.

En ĉiuj konkursoj naskiĝas novaj rezultoj, novaj nomoj iĝas komune konataj, junaj talentuloj ekiras kun la promeso de esperplena disvolviĝo. La Budapeŝtaj konkursoj de dirigentoj ankaŭ kontribuis al tio, ke la ĉi tie malkovritaj talentuloj eĉ pli ambicie plimultigu la valorojn de la universala muzikkulturo. Ni esperas, ke la venkintoj de la konkursoj volonte rememoros pri ĉi tiu konsiderinda stacio de sia arta kariero, kaj se ili kelkfoje revizitos nin, ni salutos ilin sincere kaj ankaŭ iom fiere.

István *László*

* partituro (gvidlibro) estas tiu muziknotaro, kiu entenas ĉiujn tonojn de la verko. La dirigento el tiu instruas la komunan ludon de la ensemblo kaj el tiu direktas la prezentadon.

Esperantaj libroj en Biblioteko „Gorkij"

La Ŝtata Biblioteko „Gorkij" en Budapeŝto estas la plej granda fremdlingva librejo en Hungario. De kelkaj jaroj la biblioteko sisteme aĉetas ankaŭ esperantlingvan materialon, kaj nun ĝi jam havas atentindan kolekton de pluraj centoj da volumoj. Hungaraj — precipe Budapeŝtaj — esperantistoj ofte vizitas la bibliotekon, kiu ne nur havas tre agrablan leg-salonon, sed ankaŭ pruntas librojn. Sur la foto Georgi *Mihalkov*, kunlaboranto de nia revuo kaj de la biblioteko, prezentas esperantlingvan libron al juna legantino.
Foto de Zoltán Fejér

Leningrada Esperanto-teatro progresas

En n-ro 1979/2 de HV oni povis legi pri la komencaj paŝoj de la Leningrada Esperanto-teatro el la plumo de ĝia lingva gvidanto, Viktor *Goĥŝtejn.* Intertempe ni ricevis novajn informojn pri la aktivado de la junaj aktoroj: en marto de tiu ĉi jaro ili gastrolis en la estona urbo Tartu, kien alveturis ankaŭ multaj aliurbaj estonaj esperantistoj. Nia foto montras amuzan momenton de la bulgara popola humura sceno „Ni estas el Gabrovo".



Pri la hungara medikamento-industrio



Ĉiuj brancoj de la kemia industrio povas esti aparte danĝeraj por la natura medio. Sur la bildo: en la Medikament-fabriko de Kőbánya (Budapeŝto) oni faras specialajn mediprotektajn analizojn.

La efiko de la teknika-scienca revolucio manifestiĝas — krom en la elektronika industrio — plej okulfrape en la kemia industrio. Enkadre de la ĉi lasta, la industrio de medikamentoj evoluis aparte dinamike dum la nuna jarcento. Tio grave kontribuis al la plilongiĝo de la homa vivo. La signifo de la medikamento-industrio superas tiun de aliaj industriaj brancoj, ĉar ĝi plej rekte servas la homan vivon.

Fina kontrolo de la pretaj medikamentoj en aparta laboratorio — tasko ege grava, ja konsekvenco de eventuala misproduktajo estas tute alia ĉi tie, ol ekz. en tekstila fabriko.

La hungara medikamento-industrio baziĝas sur pli ol centjara tradicio, tamen la decidan etapon de sia evoluo ĝi atingis komence de la 20-a jarcento. Antaŭ ol detaligi tion, ni skizu mallonge la historion de la hungarlanda medikamento-industrio.

La fondiĝo de tiu industria branco en Hungario ligiĝas al la nomo de Dániel *Wágner,* kiu evoluigis sian apotekon manufakturo en la jaro 1834. La unuan modernan — en la senco de la tiamaj cirkonstancoj — kuracilfabrikon oni funkciigis rezulte de lia iniciato en la jaro 1867 en Pest. La fondo de la hungaraj medikamento-fabrikoj funkciantaj nuntempe okazis dum la jaroj 1900—1914.

La evoluo de la hungara medikamento-industrio plirapidiĝis depost 1948. La produktonivelon havitan antaŭ la dua mondmilito (1938) la hungara medikamento-industrio atingis en 1950. *Depost tiu tempo* — dum 30 jaroj — *la valoro de la jara produktado kreskis je 130-obla nivelo.*

Koncerne la kreskadon de la medikamento-eksporto oni povas konstati simile grandskalan evoluon. La eksporto al la kapitalismaj ŝtatoj kreskis 40-oble dum la jaroj 1955—1979, kaj samtempe la liverado al la socialismaj landoj plialtiĝis je 35-obla nivelo.

Surbaze de tiuj rezultoj, la pozicion de la medikamento-industrio en la hungara popolekonomio karakterizas la subaj indikoj:

— la eksporto de medikamentoj konsistigas 4,32% de la tuta eksporto; al tio aldoniĝas plia 0.5% devenanta el la liverado de vegetal-protektiloj, produktitaj fare de la medikamento-industrio,

— en la eksporto al la socialismaj landoj medikamentoj donis 6,05%, dum en la eksporto al la ne-socialismaj ŝtatoj ilia proporcio atingis 3,81%.

La hungara medikamento-industrio donas *1,5% de la tutmonda medikamento-produktado* kaj samtempe 5% de la tuta medikament-eksporto de la mondo.

La hungara medikamento-industrio staras sur monda nivelo laŭ la kreskado de la evoluo: ĝi havas la 7—8an lokon en internacia skalo. Ĝi kapablas kontentigi 76% de la enlanda bezono — la ceterajn medikamentojn ni importas.

Hungario estas la plej granda eksportanto de medikamentoj en la kadro de KEI (Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo), kaj la hungaraj medikamentoj estas konataj en ĉiuj landoj de la socialisma ekonomia unuiĝo.

La produktaĵ-sortimento de la hungara medikamento-industrio enhavas ĉ. 300 medikamentojn, el kiu *ĉ. 30 estas frukto de la laboro de hungaraj farmakologoj-esploristoj.* Aliaj landaj medikamento-industrioj produktas ordinare nur 50—60 medikamentojn.

En Hungario funkcias ses fabrikoj de medikamentoj. Tiuj ses fabrikoj kaj du esplorinstitutoj fondis la *Unuiĝon de la Hungara Medikamento-Industrio* (Magyar Gyógyszeripari Egyesülés) por akordigo de siaj komuninteresaj agadoj. Al tiu unuiĝo apartenas ankaŭ „Herbaria", entrepreno pri kuracplantoj. Ce-

tere, 30% de la hungaraj medikamentoj vendiĝas enlande, kaj 70% estas eksportitaj.

La tuto de la hungara medikamento-industrio estas inter la 20 plej grandaj medikament-produktaj bazoj de la mondo.

La prognozoj pri la monda medikamento-produktado dum la okdekaj jaroj antaŭvidas dinamikan evoluon.

La tasko de la hungara medikamento-industrio estas pliigi la produktadon kaj la eksporton, kaj paralele kontentigi altnivele la enlandajn pretendojn.

Koncerne la nuntempan pozicion kaj celojn fiksitajn por la plua evoluo, la hungara medikamento-industrio alfrontas la jaron 2000 kun la firma decido, ke ĝi pliriĉigos siajn valorajn tradiciojn kaj plialtigos sian renomon en- kaj eksterlande.

Parolante pri la strukturo kaj pozicio de la hungarlanda medikamento-industrio, nepre estas menciindaj ankaŭ la hungaraj farmakologoj, kiuj — celkonscie kaj persiste laborante — pretigis kaj donis al la homaro sanigajn, eĉ vivsavajn medikamentojn.

El la multaj hungaraj farmakologoj konataj tra la mondo elstaras fronte la „Savinto de l' patrinoj", d-ro Ignác *Semmelweis*, kiu en la jaro 1847 unua en la mondo aplikis desinfektan klorakvan manlavadon por preventi la akuŝejan infekton, kaŭzintan morton de multaj akuŝintinoj. La dua estas la Nobel-premiito d-ro Albert *Szentgyörgyi*, malkovrinto de la C-vitamino (1929) kaj P-vitamino (kune kun d-ro I. *Rusznyák* en 1936). Ankaŭ nuntempe laboras multaj farmakologoj-esploristoj en Hungario, kun la celo servi la homaron per inventado de novaj grandefikaj medikamentoj.

Lajos *Kapitány*

Por pli efika nacilingva informado

Ekspansio estas nepra vivnecesaĵo de la Esperanto-movado. Esperantistoj neniam rajtas kontenti pri la nivelo de disvastiĝinteco de sia lingvo, kaj retiriĝi inter siajn amikojn-verdstelulojn. Tio estus egoismo, ja Esperanto devas servi kiel eble plej multe da homoj, kaj ne nur malvastan rondon de intimaj geamikoj.

Sed por konvinki la homojn, ke ili lernu Esperanton, necesas informi ilin pri la lingvo kaj pri la jamaj rezultoj de ĝia aplikado. Tion oni devas fari nacilingve, kaj en tiu punkto esperantistaj organizaĵoj ofte sentas sin paralizitaj, ĉar mankas al ili informkanaloj al la vasta publiko.

La hungara Esperanto-movado konsciis tiun ĉi problemon, kaj antaŭ sep jaroj, fine de 1973 ĝi povis fari grandan paŝon: estis fondita la dumonata nacilingva revuo *Eszperantó Magazin* (Esperanta Magazino), kies titolo poste ŝanĝiĝis je *Világ és Nyelv* (Mondo kaj Lingvo). Tiu ĉi revuo aĉeteblas praktike ĉe ĉiuj gazetkioskoj, kaj oni povas aboni ilin per la sama maniero, kiel iun ajn nacilingvan gazeton. Ĝia teknika kvalito ne postrestas al la meza nivelo de la hungara gazetaro, kaj tiel ĝi inde reprezentas la lingvon kaj la movadon antaŭ la neesperantistoj.

Világ és Nyelv ne celas rekte persvadi la homojn lerni Esperanton, sed deziras konsciigi ilin pri la ekzisto de la lingva problemo, kaj informi ilin pri la malavantaĝoj, kiuj sekvas el la lingva kaoso en la internaciaj rilatoj. Ĝi vaste prezentas ankaŭ la vivon kaj strebadojn de la Esperanto-movado. De tempo al tempo ĝi intervjuas politikistojn, lingvistojn kaj diversajn fakulojn, kiuj grandparte donas sian publikan subtenon — kaj plej ofte ankaŭ praktikan helpon — al la plua disvastigo de la lingvo. Estas malfacile diri, kiom da novaj esperantistoj „varbis" tiu revuo, sed ĝi nepre multe kontribuis — malgraŭ la modesta, 6—7000 ekzemplera eldonkvanto — al tio, ke la ĝenerala publika opinio pri Esperanto en nia lando estas tre favora.

Por la jaroj 1974, 1978 kaj depost tiam ĉiujare aperas ankaŭ 240-paĝa „jarlibro" aŭ „almanako" de *Világ és Nyelv*. La eldonkvanto de tiuj fakte diketaj libroj atingas po 20 000 ekzemplerojn. Ili servas la saman celon, kiel la revuo, tamen, en tiuj almanakoj povas aperi ankaŭ pli ampleksaj kontribuaĵoj.

Estas menciinde, ke la kunlaborantoj de la revuo kaj de la almanakoj estas ne nur esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistaj ĵurnalistoj, universitataj profesoroj, verkistoj, tutlande konataj kulturaj kaj politikaj agantoj. Tio donas altan prestiĝon al tiuj eldonaĵoj. La hungara gazetaro ne malofte referencas al artikoloj aperintaj en *Világ és Nyelv* kaj ĝiaj almanakoj.

La hungaraj esperantistoj ne dubas, ke la vojo, kiun ili elektis antaŭ sep jaroj por efikigi la nacilingvan informadon, estas sekvinda. La redaktoroj de *Világ és Nyelv* esperas, ke ili baldaŭ povos kunlabori kun redaktoroj de aliaj — fondotaj — nacilingvaj priesperantaj revuoj.

(—czik)

La ĉi-jara almanako de „Világ és Nyelv' publikigas interalie superrigardon pri la ekzamenado de Esperanto fare de gravaj internaciaj organizaĵoj (Ligo de Nacioj, UNESKO ktp.)



LAJOS NAGY:

Absurda biontologio

La formiko

Laŭ grando kaj koloro, la formikoj estas diversaj, ĉe ni, Eŭrope, la plej oftaj estas la malgrandaj nigraj kaj iom pli grandaj ruĝaj formikoj, kaj tropike troviĝas grandaj, eĉ grandegaj formikoj, ankaŭ flavaj kaj grizaj. Bluaj formikoj ne ekzistas, kiu atestas certan modeston krom ĉiu riĉaĵo de la naturo. La formikoj vivas ege maturan socian vivon, ili kunlaboras surbaze de organiziteco bone funkcianta, kaj feliĉe, ke ili ne kantas ĥore kaj ne havas apartan fakrevuon.

La formikoj vivas sub tero, en pompaj loĝejetoj, kaj eksteriĝas tra funelforma trueto, ĉirkaŭ kiu trueto videblas malgranda monteto el la tero nazplugita. Inter tia funelforma trueto kaj la najbara funelforma trueto kuras malgranda vojeto, sur ĉi tio cirkulas la formikoj unu post la alia, kiel soldatoj. Kiel zorgeme estas konstruitaj ĉi tiuj vojoj, tion montras, ke laŭ kelkaj troviĝas ankaŭ arbegoj, precipe laŭ tiuj, kiuj kuras ĉe piedo de grandaj arboj.

En la subterajn loĝejetojn la formiko kunportas somere nutraĵon por vintro, laŭ kio ŝajnas, ke ĝi estas ege prudenta besto, ne mirinde, ja ĝia kapo estas preskaŭ tiel granda, kiel ĝia abdomeno, kaj certe, ke ekz-e ankaŭ vi estus pli prudenta, se via kapo estus tiel granda, kiel via trunko. Krome ĉi tiu pardonebla stokado montras ankaŭ tion, ke la formiko estas antaŭvidema besto, kio estas mirakla natura fenomeno, ĉar ĝiaj okuloj sidas flanke.

La malgrandaj socioj de la formikoj nomiĝas formikejoj. Ĉi tiuj malgrandaj socioj estas tre batalemaj, se ekz-e raŭpo aŭ lacerto enformikejiĝas, la formikoj surgrimpas kaj mortigas, formanĝas ĝin. Tial bone, se iu surpaŝas formikejon kaj piede ĝin dispremas. Kiu batalas, kontraŭ tiu oni devas batali. Ekzistas tiei malbelaj formikejoj enmonde; bedaŭrinde, ne estas konvena piedego kun boto por ili ĉiuj. La formikoj demetas po unu ovon tage. La formika ovo estas blanka kaj relative tre granda, ĉar ĝi estas preskaŭ tiel granda, kiel duona korpo de formiko. La formikino estas modesta besto, ĉar tiun grandan ovon ĝi demetas en silento, sen kluko, ne kiel multparola kokino, kiu faras pro kokina ovo relative malgranda tiom da bruo, ke ne mirinde, se kokina ovo kostas tiom multe. La vivodaŭro de la formiko estas ankoraŭ nekonata. Elstarega natursciencul volis konstati ĝin, kaj tiucele li komencis observi formikon, kuŝantan en ombro de herbero. Du jarojn li observis ĝin, sed tiam li enuis la pluan observon, kaj pri la rezulto de sia observado verkis sepdek-folian laboraĵon, en kiu li demonstris, ke formiko nepre ĝisvivas almenaŭ du jarojn. Sed poste alia, pli elstara natursciencul demonstris, ke la observo de la elstara sciencul n-ro unu estas senvalora, ĉar li konstatis aŭtente, ke la formiko, observita de tiu, estis mortinta jam en la unua momento de la observo.

La leono

La leono estas la reĝo de la bestoj, respektata ankaŭ de respublikanoj. Ĝia forto estas eksterordinara, pli granda, ol tiu de Hackenschmiedt.[1] Per unusola bato de sia vosto ĝi kapablas sterni homon, se ne, ĝi mistrafis. La leono estas tre elasta kaj lerta, ĝi kuras pli rapide, ol virĉevalo, sed, se ĝi volas, ĝi kapablas iri malpli rapide, ol fiakroĉevalo. Ĝi kapablas salti eĉ dekdu metrojn, precipe tiam, se ĝi demetas la mezurilojn ne laŭlonge unu antaŭ la alian, sed laŭlarĝe unu post la alian.

La leono estas la plej kuraĝa sovaĝbesto, sed tial ĝi ne pretendas ordenon. Ĝiaj patrioj estas Afriko kaj Azio, en aliaj kontinentoj ĝi troviĝas kiel nura regato de fremda ŝtato, kaj pro manko de pasporto kaj aliaj dokumentoj ĝi estas internigita en bestĝardenoj.

Se iu piediras en dezerto kaj hazarde renkontas leonon, tiam komence li faras ne rekoni ĝin, kredi, ke ĝi estas bovido. Se la leono tamen frenezumas, tiam la homo haltas, kaj rigide rigardas al okuloj de la leono; ĝis kiam li rigardas rigide, nenio malbona okazas al li, eĉ pli, se la koncernulo rigardas rigide ĝis kiam li alvenas hejmen, tiam li tute liberiĝas.

La vira leono estas pli granda, ol la ina, kio estas scienda, ĉar se leono atakas homon, tiu scias almenaŭ, ĉu vira aŭ ina ĝi estas. Krome la kolo de la vira leono estas kovrita de abunda kolhararo, bone varmiganta; ĉi tio atestas la eminentan prizorgon de la naturo: kvankam en la patrio de la leono estas 40—50 gradoj da varmo, tamen povas okazi post kelkaj centmiloj da jaroj, kiam jam ankaŭ la suno komencas malvarmigi, ankaŭ tie estos iom pli malvarme, kaj tiam la kolhararo servos bonege. La leono estas flava, ankaŭ ĉi tio estas eminenta principo de la naturo, pro t. n. konformiĝo al medio estas tiel, nome ĝi havas koloron saman, kiel tiu de la sablo de la dezerto, por ke ĝi estu malfacile rekonebla, kaj zebroj, antilopoj, leporoj kaj aliaj bestoj ne ataku ĝin, kompatindan. La principo montriĝas pompe konvena, la nomitaj bestoj ne atakas la leonon, tiom ne, se la leono volus, ke la nomitaj bestoj ĝin ataku, ĝi devus surmeti intence ruĝan surtuton.

La hungara bienulo

La bienulo estas rozvanga grafo, kiu por matena preĝo (ĉar li estas kredulo!) ankoraŭ lite manĝas fiŝon, malvarman rostaĵon, kompaktan marmeladon, kreman kafon, puntornamitan buŝtukon, neĝblankan panon kaj arĝentan forkon, post matenmanĝo aŭdience akceptas la bienestron kaj la bienvoktojn, kiuj staras palise antaŭ li, kun tremanta kantado parolas kaj forironte salutas per „mi kisas viajn manojn"; kiu nenion komprenas el la prezentoj de la bienvoktoj, sed li mallaŭdas ilin auf alle Fälle[2]; kiu post aŭdienco aŭ ĉasas, aŭ kuŝas surdorse la divanon kaj ĝis tagmanĝo rigardadas la plafonon sen pensi ion; kiu estas je tagmanĝo priservata de livreaj ĉambristoj, irantaj piedpinte; kiu tagmanĝas buljonon, antaŭan manĝaĵon, rostaĵon kun garnaĵoj, glaciaĵon fromaĝon, frukton, kaj vinon el Badacsony kun belaj francan nomoj; kiu post tagmanĝo trinkas konjakan grajnokafon sen sukero; kiu post tagmanĝo fumas Egiptan cigaron, kaj erudicie konvercias ĝis la kvina-sesa horo pri tio, kiel fiaj estas judoj; kiu ĉirkaŭ vespero veturas kaleŝe aŭ denove

ĉasas, aŭ surprizas unu el siaj bienvoktoj kaj denove mallaŭdas lin; kiu vespere rekomencas manĝi la antaŭan manĝajon.

La proprajo de la bienulo estas la t. n. bieno. Ĝi konsistas el multega tero, ĉirkaŭata de stinkaj fosajoj kaj belaj arboj, sur kiu produktiĝas tritiko kaj maizo, sur kies mezo paradas la kastelo kaj la farmo. La kastelo kun dudek-tridek ĉambregoj belegaj paradas sur beleta monteto, antaŭ ĝi situas la korto, poste sekvas la ĉavalejo, post la ĉevalejo staras la bovejoj kaj la remizoj, por fini, trans ĉi ĉio impertinentas la servistejoj.

La servistoj kaj la dungitoj estas friponaj kampuloj, kiuj estas salajrataj malamikoj de la bienulo, kiuj estas malbelaj kaj stinkaj, ĉar tuttage ili nazplugas la teron, ili ĉiuj devus esti mortbatitaj kaj enterigitaj apud la fiajn judonj.

La ĉevalejoj pretiĝas el brikoj, ili estas larĝaj, altaj, kalke blankigitaj, kaj havas asfaltan plankon; la bovejoj estas iom pli modestaj, tamen beletaj; sed la servistejoj pretiĝas el argilbrikoj kaj koto, ilin faras ciganoj.

Biene per la impertinenta nazplugo de la stinkaj kampuloj estiĝas grandaj enspezoj, sumantaj plej ofte pli ol unu milionon da kronoj, kaj kaŭzas zorgegon por la bienulo, kiel elspezi ilin, kaj tial li mallaŭdas denove la stinkajn dungitajn kampulojn kaj la fiajn judojn.

Kastele la bienulo ne povas elspezi sian monon, tial li vojaĝas en la ĉefurbon, kaj utiligas la helpon de belaj virinoj, nomataj aktorinoj fare de la popola buŝo evidente pro ĉi tio.

En la urbo la bienulo havas ankaŭ multan zorgon kaj laboron, li devas tutnokte kartludi en la magnata kazino, posttagmeze li devas galopigi, kaj apenaŭ li havas tempon por mallaŭdi la judojn kaj la dungitojn kaj tiujn skribaĉantajn ĵurnalistojn, ekz-e min, kiu skribas ĉi tion pri li, kompatinda.

Kiam la mono elĉerpiĝis, la bienulo envagoniĝas kaj hejmenveturas. En Kis-Bagos, t. e. Kutyamajsa[3] li elvagoniĝas, kvar dikaj ĉevaloj, kaleŝo kaj tiu stinka kaleŝisto-kampulo lin atendas, li ekiras zorgoplene al sia kastelo, proksimiĝante, ili vidas jam la fosrandan tabulon:

„Por almozuloj, gurduloj kaj ŝtatadministruloj la eniro estas strikte malpermesata!"

El la hungara: István *Takács*

[1] Georg Hackenschmiedt: germana ĉampiono pri luktado estis.

[2] Ĉiaokaze (germanaĵo).

[3] Neekzistantaj, mokaj vilaĝnomoj, sugestantaj primitivecon, provincecon.

Rabindranath Tagore kaj Esperanto

Bernard Golden

Kio estis la sinteno pri Esperanto de Rabindranath Tagore (1861—1941), la eminenta bengala poeto, novelisto, romanverkisto kaj Nobelpremiito? Ĉu tiu mondfama verkisto estis esperantisto aŭ nur simpatianto de la ideo de internacia lingvo? Anstataŭ ripeti rimarkojn pri li faritajn de tro propagandemaj zelotoj, mi preferas citi liajn proprajn vortojn pri la internacilingva demando okaze de vojaĝo, kiun li faris en Eŭropo en 1926.

En tiu jaro, estante en Vieno, Tagore malsaniĝis, kaj kuracistoj en la Aŭstria ĉefurbo konsilis al li iri al Balatonfüred en Hungario por kuracado. Tiucele li pasigis dek tagojn en Elizabeta Sanatorio *(Erzsébet Szanatórium)*. Dum restado apud la granda lago Balatono, la hindia poeto finpretigis unu el siaj plej famaj verkoj, „Lampiroj". En novembro 1926 li plantis memorarbon en la parko de Balatonfüred kaj verkis poemon en la angla kaj bengala lingvoj.

Gábor Lipták kaj Marianna Somogyi, en sia verko *Rabindranath Tagore* (1961, p. 44), priskribas la restadon de Tagore en la Balatona kuracloko jene.

„La dungitoj de la Sanatorio en mallonga tempo akceptis en sian koron tiun afablan poeton kun ĉarmaj manieroj. Oni rakontas, ke Tagore disdividis inter ĉiuj dungitoj de la Sanatorio tiujn donacojn, kiujn li ricevis de siaj admirantoj. Lia plej ŝatata konversacia kunulo estis d-ro Horváth; ili bone komprenis unu la alian en la angla lingvo kaj en Esperanto."

Ĉu Tagore vere parolis Esperante kun la sanatoria kuracisto, aŭ ĉu li nur iomete komprenis ĝin pro sia scio de aliaj eŭropaj lingvoj? La vortoj de la poeto mem ĵetas lumon sur tiun ĉi demandon. Unu monaton antaŭ ol li venis al Hungario, li estis en Zagrebo, Jugoslavio, kie okazis intervjuo ĉe la tiea radio-dissendejo. Tagore diris:

„La lingvo [Esperanto] estas al mi certagrade konata, sed mi ankoraŭ ne havis okazon detale pristudi ĝin. Tamen mi opinias, ke tiu lingvo ludos grandan gravecon por estontaj rilatoj de la kultura homaro."

„... mi tutkore simpatias kun via movado."

Estas, do, evidente, ke Tagore neniam lernis Esperanton, sed ja sciis pri ĝi kaj ĝiaj celoj. Apogas tion ĉi ankoraŭ unu citaĵo datiĝanta de novembro 1926.



„Ĝi [Esperanto] estas granda elpensaĵo kun grandegaj eblecoj, kiuj — tiel mi esperas — iom post iom akiros la fekundecon necesan por la produktado de vivanta literaturo."

Kvankam tiutempe Rabindranath Tagore ne sciis tion, ankaŭ liaj propraj verkoj estis destinitaj kontribui al la pliriĉigo de la Esperanta beletro en la formo de tradukaĵoj. En 1961 aperis *Malsata Ŝtono*, kolekto de sep rakontoj esperantigitaj de Lakshmiswar Sinha, disĉiplo kaj amiko de la aŭtoro. Estas rimarkinde, ke en la okpaĝa biografia eseo, kiun la tradukinto verkis por tiu ĉi publikigaĵo, ne estas iu mencio de la vidpunktoj de Tagore pri Esperanto. Ĉu povas esti, ke Sinha ne sciis pri ili? Lastatempe, en 1977, estis publikigita *Primico*, kolekto de kvindek poemoj de Tagore, elbengaligitaj de la konata lingvisto-esperantisto Probal Daŝgupto.

Konklude, oni povas aserti, surbaze de la nuntempe havebla dokumentado, ke Rabindranath Tagore neniam lernis Esperanton, kaj pro tio ne povas esti nomata esperantisto. Kiel plurdekoj da aliaj eminentuloj, li eldiris nur favoran opinion kaj kuraĝigan esperon pri la Internacia Lingvo.

Noto: La du citaĵoj de Rabindranath Tagore troviĝas en *Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj*, kolekto de citaĵoj pri Esperanto kaj la internacilingva demando, kompilita de Isaj Dratwer (1977, dua eldono, Tel-Avivo, paĝoj 104—105).

ĉapitroj el la histori

18. Konstruado de la evoluinta

La 27-an de junio 1980 la unuan fojon kunsidis la nove elektita Hungara Parlamento. Sur la bildo: Lajos Papp, prezidanto de la Tutlanda Balotkomitato raportas al la deputitoj pri la laŭleĝa okazigo de la elektoj.

Komence de la sesdekaj jaroj reordiĝis iom post iom ankaŭ la eksteraj rilatoj de Hungario: la kapitalismaj landoj devis kompreni, ke la socialisma ordo firmiĝis, kaj malaperis ĉiuj ebloj restarigi la kapitalismon en Hungario. Precipe intimaj fariĝis la kontaktoj de la popola Hungario kun la nove liberiĝintaj landoj de Afriko, el kiuj pluraj montris vivan intereson al la ne-kapitalisma vojo de socia progreso.

La dua kvinjara plano inter 1961—1965 alportis konsiderindajn sukcesojn en la ekonomia kaj socia vivo. Dum tiuj kvin jaroj la industria produktado altiĝis je 45%, la produktado de la agrikulturo je 10%, kaj la nacia enspezo kreskis je 25%.

Tamen, la evoluo postrestis al la kreskoritmo de la jaroj 1958—1960. La ebloj de la ĝis tiam adoptita kvanta evoluigo de la industrio pli-malpli elĉerpiĝis, mankis libere disponebla plia laborforto. Por havi daŭran progresadon en la ekonomio, oni devis serĉi novajn manierojn: antaŭ ĉio oni devis reformi la direktad-mekanismon de la hungara ekonomio.

La decido pri la reformo naskiĝis en la jaro 1966. Ĝiaj ĉefaj punktoj estis *malcentrigo* de la direktado, certigo de pli da memstareco por la entreprenoj, kaj emfazo al la materialaj-financaj interesoj de la laboruloj. Grava ero de tiu ĉi reformo — kiun hungaroj ordinare nomis „nova ekonomia makenismo" — estis la restarigo de intimaj kontaktoj inter la produktantoj kaj la merkato; ĝi permesis plimalpli liberan funkciadon de la varaj kaj monaj rilatoj. La „nova ekonomia mekanismo" ekis la 1-an de januaro 1968.

La novtipa direktado de la ekonomiaj procezoj montriĝis utila kaj rezultodona. Ĝi liberigis la kreopovon de multaj laboruloj, por kiuj la kadroj de la pli frua ekonomia mekanismo montriĝis malvastaj. La mezuriloj de la „nova mekanismo" pli klare montris, en kiuj entreprenoj oni faras bonan laboron, kaj kie la laboro estas ankoraŭ plibonigenda. Rezulte de la pli racia direktado, la kresko de la nacia enspezo en la tria kvinjara plano estis 40%-a, do, preskaŭ duobla, ol en la antaŭa kvinjara periodo.

Sed sukcesoj aperis ne nur en la sfero de la ekonomio. Evoluis ankaŭ la socia kaj kultura vivo. La plej signifa evento de tiu periodo estis verŝajne la reformo de la elektosistemo de parlamentanoj, kiun oni enkondukis en la jaro 1967. Dum pli frue en la tuta lando oni balotis por aŭ kontraŭ unueca listo de deputitoj, ekde tiu ĉi jaro ĉiu distrikto havis apartan deputiton, kaj por unu deputita loko povis konkuri ankaŭ pluraj kandidatoj. Tiu sistemo nepre intensigis la rilatojn inter la civitanoj kaj parlamentanoj, kaj kontribuis al la vastiĝo de la demokratio. La 10-a kongreso de la Partio en la jaro 1970 kun kontento povis inventarii la rezultojn de la forpasintaj kvar jaroj, kaj ĝi proklamis la novan celon de la hungara popolo: la konstruadon de la evoluinta socialisma socio.

La mondmerkata konjunkturo de tiuj jaroj donis favorajn kondiĉojn por la hungara ekonomio, sed tiuj bonaj kondiĉoj havis ankaŭ negativajn aspektojn. Nome, en tiuj cirkonstancoj la gvidantoj de la nacia ekonomio ne sufiĉe konsekvence aplikis la efikecon postulantajn regulojn de la nova ekonomia mekanismo, t. e. foje-foje oni rilatis tro pacience kaj „subvencieme" al la ne-efike

Hungario estas aktiva partoprenanto de la internacia vivo. Sur la bildo: János Kádár subskribas la Finan Akton de la Konferenco en Helsinki.

e la hungara popolo

socialisma socio



La hungara industrio akiris bonan reputacion por Hungario ankaŭ en foraj landoj. Sur la bildo: en Hamburg oni enŝipigas hungarajn dizelmotorajn lokomotivojn kaj pasaĝer vagonoj por Argentino.

laborantaj entreprenoj. Eĉ, ĝis 1973 signifa ono de la raciigaj preskriboj de la nova ekonomia mekanismo estis nuligita, kaj tio influis malfavora al la efikeco de nia ekonomio.

Kaj ĝuste fine de la jaro 1973 okazis ŝanĝoj, kiuj ĉesigis la mondmerkatan konjunkturon: la prezo de la nafto kaj de la energio ĝenerale, komencis kreskegi. Por Hungario, kiu uzas grandparte importitan energion, tiu kresko de prezoj montriĝis tre malfavora. Bedaŭrinde nia ekonomia vivo ne tuj reagis adekvate al tiuj prezaltigoj: oni konservis la malaltan enlandan energio-prezon, subvenciante la ĉiam pli multekostan importon, kaj tiel fakte subtenante la malŝparadon. Oni emis kredi, ke la ŝanĝoj de la mondmerkataj cirkonstancoj ne tuŝos nian ekonomion.

Tamen, la pasintaj jaroj montris, ke la altiĝado de la prezoj de energio kaj materialoj estas daŭra procezo, kaj oni devas akordiĝi al la postuloj de la aktuala mondmerkata situacio. Fine de la jaro 1978 la CK de la Partio decidis ellabori ekonomipolitikon, kiu ne celas nepran kvantan ampleksigon de la produktado, sed unuavice la maksimume efikan utiligon de la materialoj, energio kaj homa laborforto. Konsekvenco de tiu decido estas la pasintjara ĝenerala altigo de la etkomercaj prezoj, kaj la ĉijara reformo de produktoprezoj.

La ekonomiaj problemoj de la lando ne malfortigis la nacian unuecon, kiu jam depost dudek jaroj estas la ĉefa politika realajo de Hungario. Eĉ, la komuna tasko solvi tiujn problemojn, efikis tre favora al la plua solidiĝo de tiu unueco.

La stabileco de la interna politiko kaj la unueco de la nacio signife altigis la internacian prestiĝon de Hungario. Nia lando estas stabila membro de la familio de la socialismaj popoloj, kaj ni aktive partoprenas en la defenda kaj ekonomia unuiĝoj de la amikaj popoloj, t. e. en Kontrakto de Varsovio kaj en la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Tamen, ni neniel forfermas nin de aliaj landoj: Hungario estas forte interesita en la plua evoluigo de la malstreĉiĝo de la internaciaj rilatoj, kaj en la paca kunekzistado de landoj kun malsama socia sistemo.

La interna kaj ekstera politiko de la Hungara Socialisma Laborista Partio ĝuas plenan subtenon ĉe la granda plimulto de la loĝantaro: ĝin konfirmis kaj la ĉi-jare aranĝita 12-a kongreso de la Partio, kaj la elekto de parlamentanoj kaj konsilantaroj komence de junio. Hungario dum la okdekaj jaroj daŭrigos la konstruadon de la evoluinta socialisma socio.

En tiu ĉi numero ni finas nian serion „Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo", kiun ni komencis en la n-ro 1978/1 de HV. Ni esperas, ke tiu serio povis iom proksimigi nian landon al la eksterlanda legantaro, kaj ke ĝi povos servi kiel klariga fono ankaŭ por niaj aliaj artikoloj pri la pasinto kaj nuntempo de nia lando.

Multaj hungaraj fakuloj laboras en eksterlando — ĉefe en aliaj socialismaj landoj kaj evolulandoj, por transdoni la spertojn de la hungara ekonomio. Sur la bildo: hungaraj fakuloj klarigas la funkciadon de kudromaŝino en la Vestfabriko de Ulan-Baton (Mongolio), kunstruita kun hungara helpo.

István Torda:

Jarcentoj de la hungara literaturo

10. Aliaj verkistoj de „Nyugat”

Krom la verkistoj de la revuo „Nyugat” (Okcidento), konsiderataj jam klasikaj, pri kiuj temis la pasintan fojon, al tiu organo literatura apartenis ankoraŭ tuta aro da grandsignifaj verkistoj kaj poetoj.

Ernő *Szép* [Sep] (1884—1953) estis la plej delikata poeto hungara de la dekadenco kaj de la impresismo. Lia prozo trapenetrita de lirikaj elementoj estis ankaŭ tre populara. Oszkár *Gellért* (1882—1967) unu el la redaktoroj de „Nyugat” kreis poezion malpli riĉan je bildoj, sed rigore logikan, naskantan disciplinitan lingvajon. Dezső *Szomory* [Somori] (1869—1944) multe klopodis por formi stilon absolute individuan, atribueblan al neniu alia. Liaj romanoj, rakontoj, dramoj plenas je lirikaj akordoj, sentimentaliĝoj, entuziasmiĝoj.

Soleca figuro de la literaturo hungara estas Gyula *Krúdy* [Krudi] (1878—1933). Li laŭ la epoko de sia vivo povus aparteni al la grupo de „Nyugat”, sed liaj vivo, arto estas alitipaj. Pri li pli frue naskiĝis romanoj ol kritikemaj studoj, li ja loĝis en hoteloj, eĉ foje-foje en bordeloj, ofte vizitis la hipodromon, kartludejojn, forpelis el kafejoj husar-oficirojn. Apud tia vivmaniero Krúdy verkis kapturne multon: lia postrestinta verkaro plenigas 150 volumojn. Tio estas amaso da romanoj, noveloj, krokizoj. La Krúdya verko estas rakontata per stranga, lirika voĉo. La agado kaj la karakterizo iras al la dua plano, regas la etoso, la konstruo solviĝas en la meditadoj, perdiĝas en la ĝangalo de la devojiĝoj. Li sugestas, ke oni vivas en la mondo de la sonĝoj, kie kunfandiĝas la aso kun la iso, la figuroj perdas siajn konturojn. La konantoj de la Krúdy-verkoj la lokon de tiu ĉi verkisto vidas apud Marcel Proust kaj Jean Girodoux. (Pri Krúdy pli detale vd. en HV 1978/4. — Red.) Kuntempano de Krúdy estis Ferenc *Móra* (1879—1934), kiu restis dum la tuta vivo provinca verkisto. Li en la noveloj altigis ĝis la nivelo beletra la karakterizan malriĉkampulan sintenon, la multsignife artifikan paroladon kun la moŝtuloj. La verkojn de Móra penetras anekdotoj, la leganton li ĉarmas precipe per sia escepta rakontemo. (Pri kaj de Móra legu en HV 1979/4. — Red.)

Sur la paĝoj de „Nyugat” komenciĝis ankaŭ la verkista kariero de Lajos *Nagy* [Nadj] (1883—1954), sed li nur malstrikte ligiĝis al la revuo. Post Kálmán *Mikszáth* li estis la plej grava satiristo hungara, krome la plej bataleme socialistkoncepta prozisto en la intermilita Hungario. Li multe eksperimentis pri variaj formoj kaj specoj de la novelo, iĝinte tiel unu el la novigistoj de la hungara literaturo. La rakontojn de Nagy karakterizas seka, objektiva stilo, apenaŭ montranta emociojn, krome senindulga realismo.

Avangardisto kaj socialisto

La verkado de Lajos *Kassák* [Kaŝŝák] (1887—1967) reprezentas apartan koloron en la ĉi-jarcenta hungara literaturo unuavice pro perado de akiraĵoj de la Eŭropa avangardmovado. Li en Budapeŝto estis fabriklaboristo, poste preskaŭ nur perpiede vagadis tra Aŭstrio, Germanio, Belgio. Li atingis eĉ Parizon. Post la reveno li konscie elektis la verkistan karieron. Aŭtune de 1915 li fondis revuon antimilitisman, avangardisman, titolitan „Tett” (Ago). La aperigo de la revuo estis malpermesita, tiam li eldonis ĝin sub alia titolo. La samon faris Kassák en Vieno, kiam post la frakaso de la Hungarlanda Konsilia Respubliko li devis elmigri, kaj post 1927, kiam li revenis hejmen. Tiu Kassák-revuo grupigis la junajn verkistojn, kies verkado parencis kun tiu de la maldekstra alo de la germanaj ekspresionistoj. Kiel estetikisto kaj pentristo li estis grava reprezentanto de la konstruivismo. Decembre de 1915 li publikigis la poemon *Metistoj*, de kiu komenciĝas la unua matura periodo de lia poezio. Li iras laŭ la spuroj de la Whitman-eska „libera verso”, kaj fruktuzante elementojn de diversaj ismoj, li ellaboras la Kassák-an formon de la verso libera. En 1920 en la elmigrinteco li verkis la plej grandan verkon de la hungara avangardismo, la „lirikan eposon” *Ŝtiparoj Kantas*. La poemego estas monumento pri la Konsilia Respubliko. Post la hejmenveno li plurajn jarojn verkis sian aŭtobiografion, similan al tiu de Maksim Gorkij, titolitan *La Vivo de Homo*. Ekde la 30-aj jaroj la intereso de Kassák pli kaj pli turniĝis al la prozo, sed la romanoj nur en kelkaj fragmentoj trovis la nivelon de la aŭtobiografio, siajn pintojn Kassák akiris en la noveloj kaj en la versaĵoj.

Elmigrintoj

Post la malvenko de la Konsilia Respubliko la hungara literaturo socialisma evoluis ankaŭ en la verkado de verkistoj-elmigrintoj. Ankaŭ en la elmigrinteco formiĝis en la grupo de verkistoj-komunistoj Aladár *Komjáth* (1893—1937). La unuaj poemoj de Komjáth aperis en la revuo *„Ma”* (Hodiaŭ), redaktita de Kassák. En ti-

Gábor Andor



Kassák Lajos



Nagy Lajos

uj verkoj kun detruitaj formoj krude montriĝis la emocioj. Li aktive partoprenis la eventojn de la Konsilia Respubliko. En la jaroj 1921—1922 li vivis en Vieno, poste en Berlino. Post la potencakiro de la nazifaŝismo li transloĝiĝis al Svislando, poste al Francio. Li estis redaktoro, oratoro, poeto, arttradukisto kaj verkinto de studoj. Lia poezio fariĝis pli kaj pli simpla kaj forta, li trovis konsternajn vortojn por kondamni la militon, voki la revolucion, novan mondon.

Andor *Gábor* (1884—1953) komunistiĝis en Vieno post 1919. Rezulto de lia ĉitiea verkado estas publicistiko havanta antaŭe ne spertitan forton. Tiu verkado uzas tutan arsenalon de la vitriola satiro, tiun de la paskvilo politika. Lia celo estas senmaskigi la Hungarlandajn kontraŭrevolucion kaj blankan teroron, vipi la homajn stultecon kaj malbonecon. Ekde 1933 Gábor laboris en Moskvo, kiel redaktoro de la revuo *„Új Hang"* (Nova Voĉo), organo de la elmigrintaj hungaraj verkistoj-komunistoj. Lia plumo naskis poemojn, novelojn, artikolojn. Fortaj pecoj de lia antifaŝisma poezio estis legataj en la frontoj de la Dua Mondmilito.

Béla *Balázs [Balaĵ]* (1884—1949) estis unu el la konataj verkistoj de la revuo „Nyugat". Laŭ lia libreto Béla *Bartók* komponis sian faman operon *Burgo de la Blubarba Duko*. En la poemoj, misterajoj, fabeloj Balázs montriĝas adepto de la ekstrema simbolismo. Post la Konsilia Respubliko li loĝis en Vieno kaj en Berlino, kie li iĝis tutmonde konata fondinto de la moderna filmestetiko. En 1931 ankaŭ li transloĝiĝis al Soveta Unio, kie li partoprenis la laboron de la hungara verkisto-grupo. La poezio de Balázs bone montras la politikan-mondperceptan evoluon: li turniĝis „al la tero" — t. e. li fariĝis unuavice poeto politika.

Béla *Illés* [Illeŝ] (1895—1974) estis unu el la plej popularaj inter la verkistoj, vivintaj en Soveta Unio. Lia verkista arsenalo multe heredis de la anekdoteca stilo, farita preskaŭ perfekta dank' al Kálmán Mikszáth. Sed senteblas en liaj verkoj ankaŭ efiko de la filmo, la ekscito de raportaĵo. Lia romano *Tibisko Brulas* (1929) rakontas pri la bataloj de la Konsilia Respubliko. Lia *Rapsodio Karpata* (1939—1941) estas granda, bunta tabulo pri la regiono de la Nord-Orientaj Karpatoj el la tempo ekde la jarcentkomenco ĝis 1923.

Máté *Zalka* (1896—1937) estis militkaptito de la Unua Mondmilito. Li en Soveta Unio fariĝis verkisto-soldato. La aventurplenan vivon li finis en Hispanio kiel glora generalo Lukács [Lukaĉ] batalanta ĉe-kape de internacia brigado. Lia romano *Doberdo* rakontas kiel fariĝas oficiro entuziasmiĝinta pri la milito laŭ la vivspertoj kontraŭmilita agitisto.

La dua kaj la tria generacioj

La dua generacio de „Nyugat" ekverkis en la 20-aj jaroj, la tria en la 30-aj. En ambaŭ grupoj troveblas multaj talentaj verkistoj. Iliaj karieroj formiĝis alimaniere ol tiuj de la unua generacio. Ili komencis verki post la malvenkoj de du revolucioj — burĝdemokratia de 1918, proletara de 1919 —, ili travivis relativiĝon de valoroj.

Unu el la plej gravaj poetoj de la generacio, veninta post Ady, estis Lőricz *Szabó* [Sabo] (1900—1957). Anstataŭ la belkulto kaj la literaturismo, rigidiĝintaj je akademiismo, li faris objekto de la poezio la simplan realon de la vivo, ŝanĝiĝantan de tago al tago. Liaj kritikistoj atentigas, ke kun kelkjara malfruo li faris la samon, kiel Thomas Eliot en la angla poezio. Eĉ la paraleleco de iliaj novigoj estas interesa: miksado de la ĝenroj, enpoemigo de ĉiutagaj esprimoj. Ĉio ĉi por pli profunda konado psika, por pli komplika intelektismo.

Andor Endre *Gelléri* (1908—1945) estas elstara reprezentanto de la tria generacio. Liaj noveloj montris al la hungara legantaro mondon antaŭe nekonatan. Lia medio estas Óbuda, sed ne tiu de Krúdy. Li montras la realon de malriĉuloj, senlaboruloj, metilernantoj, portistoj. Tiu mondo havas proprajn leĝojn, atmosferon, kutimojn. Realo, fantazio, naturalismo, mitoj, liriko, baladesko miksiĝas ĉi tie en neimitebla stilo.

Tradukis: *P. A. R.*

LŐRINC SZABÓ

Poliartrito

Per pikaj botoj kaj gantoj
flamantaj vestis doloro
min ĝis genuoj, kubutoj;
teruraj dratoj per boro

tra ostoj stebis la karnon
abomenege, la nervoj
nun ĉiuj hurlas sub ardaj
kudreroj kun febraj vervoj.

Jen tiuj hurlaj veegoj
estas miaj najtingaloj,
alaŭdoj hodiaŭ, tiuj
bruaj, stultaj suferaroj,

kaj pikdoloraj ŝveladoj,
kaj ŝvebe vastiĝaj monstroj
fulmveaj genuoj, fingroj
kaj tiuj tondraj manartroj

disŝiras al mi la cerbon,
min povas memorigi jam
nur konscio pri doloro,
ke homo estis mi iam.

El la hungara: Imre Szabó

György Marosán:

Vastigantaj ebloj de la malvastiganta mondo

György Marosán (pron. djördj marošan) (1908—) estas hungara politika aganto, komencinta sian agadon inter la du mondmilitoj en la Hungarlanda Socialdemokrata Partio. Li estis ministro, sekretario de la CK de la Hungara Socialisma Laborista Partio, ĝis sia pensiiĝo en 1962. Tamen ankau poste li restis aktiva, precipe en la sindikata movado, en kiu li agas ankau internacie. La plena teksto de la ĉi-suba artikolo aperis en Világ és Nyelv (Mondo kaj Lingvo), hungarlingva revuo de Hungara Esperanto-Asocio.

La ĉiokoncernaj problemoj, rilate la ekzistadon kaj la socian progreson de la homaro estas pli gravaj ol la lingvaj. Tamen la solvo de la lingvaj malfacilaĵoj en la internaciaj interrilatoj apartenas al la signifaj problemoj de la mondo kies popoloj pli kaj pli sentas je la larĝiĝo de la interrilatoj en la politiko, komerco, scienco kaj tekniko, ke la Esperanto-movado luktas por realaj celoj. Tiu ĉi lingvo, parolata de milionoj, vere ebligas internacian amikadon sen obstakloj, kaj egalrajtecon kontraŭe al la naciismo, eĉ šovinismo de kelkaj nacioj, parolantaj tiel nomatan mondlingvon.

Mi sentas simpation al la Esperanto-movado ekde mia politika vekiĝo, kvankam, ekflamigita per ĝia logiko kaj simpleco, mi neniam havis tempon ĝin alproprigi. Sed mi ĉeestis ĝian renaskiĝon kiu pruvas la vitalecon de Esperanto. Tiu reviviĝo atestas, ke kelkaj eruditoj de la nuntempo rekonis ĝian gravecon, sed ankoraŭ ne ĉiuj. Kaj tio estas la fakto, kiu meritus grandan atenton de la flanko de ŝtatestroj. Estus do bone, se la niaj, nia patrujo aktive apogus la solvon de la problemo de internacia lingvo, kiu tuŝas la tutan homaron.

Tiu ĉi problemo jam okupis en 1920 eĉ la Ligon de Nacioj, kiam la registaroj de 14 landoj prezentis planon je la enkonduko de Esperanto en la lernejinstruado. La afero okupis do jam en la jaroj dudekaj altan interŝtatan forumon.. Kiuj do estas la malfacilaĵoj de la plietendiĝo de Esperanto, havanta la eblecon ludi grandan rolon en la kunligo de homoj? Kaj kion oni devas fari por ripeti le sukceson ĉe la menciitaj landoj?

La Esperanto-mondmovado devas evidente larĝiĝi kaj refortiĝi, sed por la bono de tiu ĉi sukceso estus dezirinde, se la ŝtataj kaj sociaj organoj de la diversaj landoj povus patroni kaj apogi la popularigadon kaj instruadon de la lingvo. Nome miaj ceteraj spertoj instruis min, ke la forto kaj amasefekto de grandaj ideoj dependas de tiuj, de kiuj la ideoj originas, kiuj povas efektive inokuli la penson de la unulingva neceseco en la animon de individuoj, endanĝerigataj de la socia fremdiĝado, nekonata en la Esperanto-movado. Ĉar ĝiaj kluboj kaj fakrondoj alproksimigas unun al la alia, faciligas interamikiĝadon, nome per la internacia karaktero de la movado, per ĝiaj kunvenoj, renkontiĝoj kaj per literaturo, ĝia gazetaro. Sekve la movado servas grandan ideon kaj gravan internacian aferon kontraŭ socia fremdiĝado en la diversaj landoj kaj kontraŭ la politikaj, ekonomiaj krizoj. Ĉio ĉi instigas nin meti la demandon: ĉu Esperanto povus iĝi ilo de la internacia fido? Ĉu malgraŭ malamo kaj armado ĝi povus esti la bazo de homa kaj nacia fido? Sen, evidente, paroli pri utopio, ke per tiu ĉi lingvo oni povus solvi ekzistantajn konfliktojn en la mondo, ĝia movado estas kaj estos batalinstrumento por la paco. Se la filoj kaj filinoj de malsamaj nacioj uzas en siaj internaciaj kontaktoj Esperanton, scias ke per ĝi oni komprenas ĉiujn homojn, kiuj per tiu ĉi ilo iĝas amikoj kaj amikinoj — ili ne malhavos plu konfidon al la tuta mondo, al homoj de malsama koloro, de diversaj ideoj.

Sekve: estas dezirinda la popularigo de la internacia lingvo, ilo de la fortigo de konfido inter nacioj, inter ĉiuj ŝtatoj, en ĉiuj sociaj sistemoj. Por mi tiu ĉi estas reala kulturpolitika tasko. Sed kiel oni povus transmeti ĉion ĉi en praktikon?

Deiru ni ekzemple de la fakto, ke la sindikatoj havas 400 milionojn da membroj en la mondo. Vere, ili apartenas al tri grandaj tendencoj: komunista, socialdemokrata kaj kristansocialista,

tamen la sindikatmovado disponas pri giganta forto, kiu ligas centmilionojn da laboristoj kaj intelektuloj, kiuj havas en tiu ĉi kadro gravan influon unu al la alia. La Esperanto-movado estis ligita jam en ĝiaj unuaj jaroj al la laborista movado, unuavice tial, ĉar la internacia lingvo signifis por la laboristoj malfermiĝantan pordon al kulturo kaj kleriĝo. Tiuj ĉi laboristoj estis instruitaj nature de intelektuloj. Tiel interrilato kun tiuj estis neevitebla. La laboristoj, kiuj lernis ankaŭ Esperanton, formis la kleran tavolon de sia klaso, kaj fine estis ili, kiuj estris la diversajn progresemajn movadojn. Ilia horizonto vastiĝis per la alproprigado de la internacia lingvo, per legado kaj analizado de la literaturo de diversaj kulturoj. Ili, do, ricevis per Esperanto senliman eblon, kiun ili devis fruktuzi en la kadro de diversaj movadoj por la paco kaj amikeco de nacioj. Tiuj ĉi historiaj faktoj estas gravaj por la sindikatoj en la tempo, kiam ekrenoviĝas ankaŭ la Esperanto-movado.

Pro tio mi konsentas kun mia amiko, k-do Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la Landa Konsilantaro de Hungaraj Sindikatoj, kiu, jam en 1974 eksplikis, ke Esperanto devus ludi grandegan rolon en la vivo de sindikatmovadoj, Aldone, li proponis, ke UEA serĉu oficialan kontakton kun la internaciaj sindikatcentroj, por ke ili patronu la internacian lingvon per simpatianta rezolucio. „Post tiu ĉi paŝo, ni, de nia flanko, kun sindikatoj de aliaj landoj, provus akceli aferon", diris k-do Gáspár. Kvankam la vortoj de k-do Gáspár havis viglan resonon en la Esperanto-movado (la intervjuo estis publikita ankaŭ en nia revuo), ne nur de la flanko de d-ro Humphrey Tonkin, kiu certigis k-don Gáspár en letero pri sia simpatio kaj interesiĝo koncerne la aferon, sed ankaŭ de la flanko de diversaj sindikatoj, tamen neniu faris la necesajn paŝojn. Mi opinias, ke UEA, kiu havas konsultajn rilatojn kun UNESKO, jam povus sin turni kun proponoj al la internaciaj movadcentroj de sindikatoj. Ĉi-maniere ankaŭ la hungaraj sindikatoj trovus eblon helpi la proponon de Universala Esperanto-Asocio. Tia iniciato de UEA estus ankaŭ nun tre aktuala. UEA povus ekspluati sian pliiĝantan reputacion en UNESKO, kaj eĉ en Unuiĝintaj Nacioj. Tamen ne nur ĝi, sed ankaŭ la sindikatoj, havantaj grandegan forton, influantaj milionojn, povus fari la unuajn paŝojn en la kunlaboro per vasta aplikado de la internacia lingvo . . . kiel agadis la anglaj sindikatistoj en 1977, kreintaj TUCEG, Esperanto-Grupon de Sindikatoj kaj Kooperativoj. Tiu ĉi nature eĉ pliigas la rolon, kiun povus ludi la hungara sindikatmovado en la progresigo de afero tiel nobla, kiel tiu de la internacia lingvo.

Ni povas trankvile diri, ke eĉ per etaj sukcesoj en diversaj landoj, en diversaj kontinentoj, la Esperanto-movado, kiu bone difinis sian celon, povus malgraŭ multaj malfacilaĵoj transponti lingvajn kaj politikajn diskriminaciojn.

(Koncizigis kaj tradukis: István Verzár)

BÉLA VIHAR

PREGO

Mi turnas min al Vi, Fora Praulo, kiu ne povis elaĉeti
nin per viaj vundoj, ho, helpu al ni elaĉeti
nin mem.
Donu puran armilon en niajn manojn, ĉar ni lernis:
kiu ne prenas glavon, tiu pereos
per glavo.
Iru antaŭ ni kun la lampo de la lumo de l' intelekto,
por ke niajn paŝojn ne logu en marĉon la brilanta
aŭ la veron de l' aferoj griziganta vorto.
Liberigu nin disde la plago de l' nacia subjektiveco,
ĉar Vi bone scias, ke la popoloj sopiras panon,
amon kaj liberon, kaj ili multe pli similas
unu la alian, ol diferencas inter si.
Instruu al ni tagon post tago, ke nia regno ligiĝas
ne al sango, ne al lingvo, ne al tero, sed al la
imperio de l' spirito, kaj ni estas civitanoj
de tiu patrio, disŝutitaj en la mondo,
sed ni rekonas unu la alian per la voĉtono,
per la luneska lumo de la rigardo, per la surfrunta stelo,
per la signoj de nia ideo, eĉ funde de l' infero.
Protektu nin, ke niajn intencojn neniam ni vidu
vanaj malprudentaĵoj, nek ni, nek la nin sekvontaj.
Fortigu niajn brakojn, ke anstataŭ panegiri la
malfeliĉon, ni batalu por neniigi ĝin, kaj el niaj pensoj
ni konstruu kunligajn pontojn inter la radikolonoj de l' espero,
de l' nordo ĝis sudo, de l' oriento ĝis okcidento, traarkante
ĉiujn dolorojn de l' jarcentoj, amen, amen.

El la hungara: V. *Benczik*

Infanvestoj el Hungario

Hungarajn infanvestojn por 2–12 jaruloj eksportas

HUNGAROCOOP Kooperativa Entrepreno

por Eksterakomerco

H—1051 Budapesto, Október 6. str. 12.

Tel.: 329-328 **Telekso: 22-4859**

JUNULARO KAJ FUTURO

Pri la junulara Esperanto-movado en Hungario

Inaŭguro de la ĉijara Junulara Esperanto-Renkontiĝo en la urbo Tata. Ĝin partoprenis pli ol 700 enlandaj kaj eksterlandaj junaj esperantistoj. Sur la foto: Imre Szabó diras sian malferman paroladon.

Mi legis en iu malnova Hungara Esperantisto eble el la jaro 1961, ke pri la janulara movado okupiĝas unusola pensiulo... Nu, tiu tempo jam delonge estas for la, junulara movado ekestis, ekkreskis kaj disvolviĝis. Hodiaŭ minimume ĉiu tria membro de nia Asocio estas malpli ol tridekjara. Unu post la alia fondiĝas la junularaj grupoj en universitatoj, altlernejoj, fabrikoj, kooperativoj... La agadsfero senĉese disvastiĝas: la aktivuloj organizas diversnivelajn araĝojn, ĉu simple nur regionan, ĉu tutlandan — iomete internacian — renkontiĝon kun plurcent partoprenantoj, junaj cerboj strecĉiĝas por traduki — kaj memkompreneble krei — sciencajn verkojn, iniciatas internaciskalan ŝakkonkurson, helpas la novnaskitan hungaran go-ludantaron, partoprenas laborbrigadojn... kaj ili ja ĝojas pro la vivo, kaj ili malkaŝas, ke tiu unusola juna vivo per Esperanto fariĝas pli bela, pli vasthorizonta, pli homa...

Mi ĉiam malŝatis tiujn, kiuj la tutan homaron volis meti en skatolojn kun etikedoj por fari — laŭ ili — ordon. Ankaŭ nun mi malŝatas ilin, sed foje-foje organizanto de movado estas devigata fari iujn kategoriojn, sed tiuj neniam volas fariĝi strikte fermitaj skatoloj, eble ni komparu ilin al la montoĉenoj, de sur kiuj malfermiĝas la horizonto antaŭ la spektanto...

Tiuj montoĉenoj estas minimume dudirektaj: ordigitaj laŭ la aĝo kaj ordigitaj laŭ la sfero de interesiĝoj. Kaj ili ĉe ĉiu paŝo krucĝas, renkontiĝas.

Laŭaĝe ni ja trovas tri gravajn tavolojn: junularon, plenkreskularon kaj maljunularon. Ili ĉiuj havas specifajn trajtojn, el kiuj tamen la pli okulfrapaj estas la ecoj de la junaĝo: konsciiĝo pri la vivo kaj samtempe postulo elprovi tiun vivon, kelkfoje eĉ provoke... kritikemo pri la vivmaniero de la „maljunuloj", grandaj fortostrecoj por krei ion — kvankam ankoraŭ ne klare difinitan —, ĉiujn facetojn: amon, amikecon, laboron, do samtempe la tutan vivon ekspluati.

El tio fontas la romantikemo de junularo, do ili volas havi multkoloran, multvoĉan, vastan, ebloriĉan movadon. Nature amuzajn kunvenojn, kluban vivon, kie troviĝas la eblo serioziĝi por momento kaj vagadi ankaŭ sur la terenoj de la sciencoj, artoj. Nia Junulara Komisiono rekonis tion, el la rekono rezultis ankaŭ la sukceso de niaj araĝoj: maje junulara Esperanto-Renkontiĝo kun sepcent partoprenantoj, Mezlerneja Ripoztendaro kun tricent gejunuloj sub la Balatona suno en junio, pasintjare la nove lanĉita Centra Internacia Esperanto-Laborbrigado kun ducent laboremuloj kaj la scienckaraktera Studenta Aŭtuna Forumo.

La vizaĝo de malnovaj movadanoj brilis pro la entuziasmo vidante tiujn imponajn amasojn, eble per kelkaj vortoj ili menciis, ke ne eble: tiom multaj ja ne povas scii Esperante, tamen la krokodiloj restas en malgrava minoritato. Kie ili alproprigis la lingvon? La respondo: en lernejoj: gimnazioj kaj bazlernejoj, en rondoj de kulturdomoj, hejme en vilaĝaj kaj urbaj loĝejoj, en la plivastiĝanta movado.

Kial? Kial lerni la lingvon? Grava demando! Por utiligi la lingvon, por viziti eksterlande amikojn, por ŝakludi internaciskale, por go-ludi, por traduki traktaĵojn sciencajn, por povi tralegi eble Asterikson kaj aliajn bildrakontojn, poste eĉ longajn romanojn, amindumi, nu jes, internaciskale... per unu vorto: por fariĝi pli feliĉa homo, per scienceca esprimo: por elformi ĉiuflanke kapablan personecon. La movado devas servi tiun klopodaron, devas subteni la iniciatojn de ĉiuj junuloj kaj realigi kiel eble plej multon por la junularo per la junularo. Ni devas atingi, ke ĉiu fartu hejme en la movado. Mi volas aldoni nur iun Homeran esprimon: „Donu laboron al la gasto, por ke li fartu hejme."

Eble estus friponaĵo diri al niaj aktivuloj: gastoj. La gasto atendas, ke la mastro metas antaŭ lin la pladon da supo preta. En la malnovaj hungaraj kamparanaj familioj estis kutimo: antaŭ ol doni la vespermanĝaĵon por eĉ la plej eta filo, la familiestro demandis, nu kaj kion vi laboris hodiaŭ? En la junularo ne povas esti familiestroj, lin malpostulas la junuloj, sed la demando de minuto al minuto estas starigita — de ĉiu al ĉiu: kion vi faris por la movado? Kaj ili laboras: grupe, sole.

Multajn atakojn devis travivi nia Junulara Komisiono: kial ĝi entreprenas tiom da laboro, da „sensencaĵo"? Kial ĝi okupiĝas ankaŭ pri tiuj junuloj, kiuj ne estas membroj de la Asocio? Tiuj demandoj venis ne de la flanko de la Prezidio, sed de aliaj „spertaj" ... istoj — spertaj en la fiksfermado de la verdaj kurtenoj.

Nia respondo al la unua demandosigno: la laboro ĉiam senĉese grandiĝanta altiras novajn kaj novajn laboremulojn, la taskoj difinitaj malkaŝas novajn fortofontojn. Se la taskaro malvastiĝas ankaŭ la homoj foriras ... Foje eĉ tio ne gravas, kion oni volas labori, nur la laboro mem. Postulo tamen estas: tiu agado ne estu danĝera por la movado! Ĉio alia estas farebla. La iniciato de agado devas fonti el la personeco. La gvidantoj devas difini ĉefe ne la laboron, ne altrudi la agadon, sed atingi, ke la homoj ekkonu la postulojn de la movado kaj laŭ tio la iniciatoj estu ĝustaj. Mi spertis: la unua propono de la novico estis iu sensencaĵo por ni, la dua jam farebla, la postaj jam necesegaj! Ne kritiku la unuan ekagon, lasu, ĝi estu farata, post iom da tempo mem la proponanto divenas la neeblecon, kaj serĉas alian taskon, sed ne foriras. Li restas hejme ĉe ni.

Kaj la nemembroj? Nu, almenaŭ dum la lasta tempo disvastiĝas la ideo: kunlabori kun la neesperantistaj organizaĵoj. Tiukaze kial ne kunlabori eĉ kun neesperantistaj individuoj. La poŝtaĵo de nia Asocio foje pezas eĉ kelkajn kilogramojn, kaj el tiuj leteroj multaj estas skribataj de junuloj — ili petas informon, ĉu Esperanto fakte estas belega lingvo, ĉu oni povas apliki ĝin ankaŭ en la komputtekniko, ks. Estas enkorbigita nek la plej bagatela, ĉiu ricevas respondon, ĉiu estas tuj registrita en adresaro, ĉar ni devas okupiĝi ankaŭ pri tiuj homoj, en kiuj almenaŭ ekmoviĝis la interesiĝo pri nia lingvo kaj movado. Laŭ nia sperto, la pli granda parto fariĝas fervora esperantisto. Ĉefe tiuj, kiuj turnas sin al ni per konkreta demando pri la aplikeblo de Esperanto, kaj tiu fako, por kiu ili volas eluzi la lingvon, estas por ili daŭra okupo (ne turismo, kaj unufojaj avantaĝoj). Per unu frazo: ni ne timas la krokodilojn!

Laboru por la tirkesto! — sufiĉe stranga vortumado, ĉu ne? Tamen per tiu devizo ekiris nova iniciato, la tradukservo. Memkompreneble en la organizado de HEJ, de ĝia specifa fako Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj. Kaj tamen komencis alveni la unuaj tradukaĵoj, elformiĝis iuspeca tradukaĵbanko, kie la valuto estas — tradukaĵo. Strange, ĉu? Se vi troviĝas en iu ajn lando, kaj interesiĝas pri iu scienca temo, vi volas ekhavi koncernajn artikolojn — tiuokaze via devo: tuj sidiĝi al la skribotablo traduki iun ajn sciencan artikolon, eĉ libron, ĉar nur per tradukaĵo vi povas pagi ĉe niaspeca banko.

La radikoj de la movado estas la kontaktoj kun la neesperantistaj instancoj. Same kiel la arboradikoj atingas nutrantajn agrotavolojn, per tiuj kontaktoj ni akiras simpatiantojn, novajn esperantistojn.

Movadano devas informi pri sia movado kaj pri ĝia ilo, la lingvo. Tiucele li povas trovi helpantojn ĉe la gazetaro. Tiu ĉi laboro havas du vojojn: verki fakajn artikolojn en fakrevuoj, kaj samtempe atenti pri la aperantaj traktaĵoj, kiuj — ĉar ili ne plu povas preteratenti Esperanton — ĉu mencias ĝin favore, ĉu atakas ĝin. En la lasta kazo la revuo aŭ gazeto tuj ricevas aron da leteroj defende al la lingvo. Tiel ni atingas, ke fakte neniu havas rajton malamike skribi pri Esperanto, ĉar tuj venas aro da reĝustigaj leteroj al la redakcio.

La hungara junularo estas organizata far Hungara Komunisma Junulara Asocio. La sukceso nepre postulas vastan kunlaboron kun ĝi. Ĉiujare aperas programplano de la menciita organizaĵo, kaj ni eldonas al la junaj esperantistoj materialon pri la formoj de kunagado.

Nuntempe ni plenrajte povas diri, ke ĉiuj ŝtataj kaj movadaj instancoj helpas nian laboron. Grava postulo estas konkretismo: klara vortumo de tio, kion ni volas. Kiam ni havas iun renkontiĝon aŭ ajnan signifan aranĝon, nepre ĉeestas ĝin la lokaj altrangaj reprezentantoj de la Hungara Socialisma Laborista Partio, de la Departementa Konsilantaro de Sindikatoj, Departementaj kaj Urbaj Konsilantaroj, Patriota Popolfronto ktp. Ilia subteno signifas ne nur moralan apogon. Per la helpo de la Ŝtata Junulara Komitato ni povas organizi favorkoste ekz. la Mezlernejan Ripoztendaron, kun la Centra Komitato de la Komunisma Junulara Asocio la laborbrigadojn — pri kiuj cetere la Centra Komitato intencas trakti internacie kun alilandaj samtipaj organizaĵoj cele al helpi formadon de internacia esperantista laborbrigada sistemo —, baldaŭ aperos diskutmaterialo pri Esperanto por ĉiuj diskutrondoj de Hungara Komunisma Junulara Asocio, kaj en la junularaj gazetoj ni povas aperigi niajn Esperanto-temajn artikolojn, korespondoproponojn. La hungara esperantista junularo diligentas ...

Imre *Szabó*

Kvankam gejunuloj ordinare ne estas riĉaj homoj, la partoprenintoj de JER aĉetis Esperanto-librojn en tre deca kvanto. (Fotoj de Ágnes Keserű.)

Talenta fabelistino

Arbara koboldo

Teréz *Alle* ne estas verkistino, sed grafikistino, tamen karakterizas ŝian arton specifa atmosfero de fabelecc. Ĉi tiu trajto ne troveblas en ĉiuj ŝiaj grafikaĵoj, sed el ŝiaj plej bonaj desegnaĵoj oni facile kaptas ŝian atmosferkrean kapablon. Jam la titoloj vekas tiajn konjektojn: *Renkonto, Arbara koboldo, Kanto de l' Kantoj* (laŭ Biblio), *Miraklo-spegulo, Fabeloj de anserpatrino.*

Ŝi estas edzino, juna patrino kaj laboras en la nord-hungarlanda urbo Diósgyőr, en la plej granda hungara metalurgia fabriko, kiel grafikistino; ŝi ne povis diplomiĝi en arta altlernejo, tamen ŝia suverena artisma mondo montriĝas matura sur la menciitaj bildoj. Ili kaptis min tuj, kiam unuafoje mi vidis ŝian ekspozicion en Budapeŝto antaŭ kelkaj monatoj. La fakto, ke ŝi naskiĝis en la sama vilaĝo kiel mi, estis aparta ĝojo. Kaj ankaŭ tio, ke ŝi estas ano de amatora artrondo de Diósgyőr, pri kiu mi (kiel juna ĵurnalisto, redaktoro) skribis multfoje, tre volonte, helpoprete.

Do, Teréz Alle estas amatoro? Ĉu tiu ĉi demando ankoraŭ estas grava? — Por mi ne. Pasintjare, en la kvina numero de HV mi prezentis naivan pentriston (Antal *Dévényi),* kaj mi daŭre opinias, ke sur la tereno de la artoj gravas nur la talento, kapablo ravi, animskui homojn. Tial mi proponis en 1972, okaze de granda ekspozicio de hungaraj naivaj pentristoj, ke ankaŭ la naivaj kaj amatoraj pentraĵoj, grafikaĵoj, skulptaĵoj meritas konstantan lokon en la Hungara Nacia Galerio, ĉar ankaŭ ili estas integraj partoj de la hungara arto.

Favorataj bildoj por mi el la verkoj de Alle estas *Renkonto* kaj *Arbara koboldo.* Jes, ĉar ili havas ĉarman animagordon, ĉar pasinto kaj nuntempo, antikvo kaj moderna tekniko, fabelo kaj realo kune vivas sur tiuj bildoj.

Mi esperas, ke ankaŭ Vi, afablaj legantoj de HV, ekŝatas per tiuj ĉi bildoj mian samvilaĝaninon, ĉar ŝi estas — talenta grafikistino, vera fabelistino.

Mihály *Gergely*

Renkonto

Arlekeno

Pál Losonczi, ŝtatestro de Hungario salutas la Fiziologian Mondkongreson.

Fiziologoj kongresis en Budapeŝto

Komence de julio en la hungara ĉefurbo oni aranĝis la 28-an Fiziologian Mondkongreson. La prestiĝan sciencan kongreson — kiu la unuan fojon kunvenis antaŭ preskaŭ 100 jaroj, en 1889 — partoprenis rekorda nombro, pli ol 6000 scienculoj el 60 landoj.

La Hungara Fiziologia Societo ricevis la komision por la ĉijara aranĝado de la kongreso en 1974, do, antaŭ ses jaroj, kiuj abunde sufiĉis zorge antaŭprepari trankvilajn laborcirkonstancojn por tiel multaj fakuloj. Enkadre de la kongreso okazis 129 diversaj simpozioj, kaj estis prononcitaj entute 3800 prelegoj. Oni antaŭvidas, ke la Eldonejo de la Hungara Akademio de Sciencoj eldonos la materialon de la kongreso en 28 volumoj.

La publiko kaj la ŝtataj instancoj donis gravan atenton al la aranĝo: la malferman solenaĵon ĉeestis, kaj salutis la partoprenantojn interalie Pál *Losonczi,* ŝtatestro de Hungario.

Hungara elektroniko sur la „podio" de la Olimpiaj Ludoj

La hungara entrepreno pri ekstera komerco „ELEKTROIMPEX", pli frue ol iu ajn hungara sportisto, povis esti certa pri sia partopreno en la ĉijaraj Olimpiaj Ludoj jam en 1975, kiam ĝi ricevis grandegan mendon pri aro da diversaj telekomunikaj instalaĵoj, necesaj por la glata aranĝado de la Olimpiaj Ludoj. La ĉefaj aparatoj liveritaj estis grandaj tabuloj por disanonco de

PANORAMO

rezultatoj, kompleta son-sistemo de pluraj sportstadionoj, kompletaj radio-studioj, komentistbazoj, profesicelaj magnetofonoj ktp. Entute sep hungaraj industriaj entreprenoj partoprenis en tiuj por-olimpikaj laboroj, je granda kontento de la sovetaj teknikistoj, kaj de la plurmiliona internacia spektantaro de la Olimpiaj Ludoj.

Elektra anonctabulo, liverita de ELEKTROIMPEX, en la Malgranda Stadiono de la Sportkombinato de Lujnik.



Renesanco de nutrovendejoj

La sortimento kaj konsumado de nutraĵoj dum la lasta jardeko en Hungario grave ampleksiĝis kaj ankaŭ transformiĝis. La kontentigan priservadon de la aĉetantoj tamen malhelpis grava manko: la vendejoj apenaŭ ŝanĝiĝis, kaj meze de la sepdekaj jaroj praktike jam ne kapablis peri al la aĉetantoj novaĵojn, kiujn ofertis la nutraĵindustrio. Tial dum la lastaj jaroj en Budapeŝto — kaj ankaŭ en aliaj urboj — estis konstruita aro da grandaj nutraĵmagazenoj, kies dimensioj grave superas la mezurojn, kutimajn por hungaroj. Tiuj grandaj magazenoj kapablas samtempe prezenti la *plenan* sortimenton de la lakta, vianda ktp. industrioj.

Junaj artistoj

La studentoj de la Budapeŝta Bildarta Altlernejo kutime elektas indan por si formon de somera

PANORAMO

Nutraĵmagazeno en unu el la laboristaj kvartaloj de Budapeŝto.

ripozo: ili partoprenas specialajn tendarojn en diversaj pitoreskaj regionoj de Hungario, por surtoligi (aŭ nur surpaperigi) tion, kio kaptas ilian fantazion. En tiaj tendaroj kreiĝas belaj skizoj, verkprovaĵoj, kiuj povas bone servi por la plua arta perfektiĝo de la kreintoj.

Hungara kabaredo

Prononcante la vorton „kabaredo", en la plej multaj landoj de la mondo oni pensas pri gaja muziko, agrable okulkaresaj virinaj formoj ktp. — sed ne en Hungario. Aŭdante pri kabaredo,

Studentoj de la Bildarta Altlernejo ĉirkaŭ la Fortikaĵo Rákóczi en Sárospatak, urbeto en la nord-orienta regiono de Hungario.

Konata kabareda aktoro parodias la tutlande konatan Nov-Jorkan raportiston de la Hungara Televido.

hungaro tuj pensas — pri *politiko*. Oni diras, ke depost la „nadiriĝo" de la hungara futbalo — kaj tio okazis ne hieraŭ! — la ĉefa amuzaĵo por hungaroj estas *politika kabaredo*. Tiu tipo de kabaredo havas fortajn tradiciojn en la lando, kaj fakte la esprimo „senpolitika kabaredo" por ordinara hungaro sonus simile kiel ekz. „senvianda ŝinko".

La pluraj kabaredaj teatroj de Budapeŝto ĉiam estas plenplenaj, kaj la regulaj kabaredoj de la Hungara Radio estas unu el ĝiaj plej popularaj programoj. Dum la jarfina festo la Radio kaj Televido kvazaŭ konkuras per kabaredoj, en kiuj cetere ofte rolas eĉ *ministroj* — kutime ili devas respondi piprajn demandojn de akralingvaj humuristoj, sed okazis jam ankaŭ inverse: ministroj intervjuis humuristojn . . .

Por kio servas artefarita ledo?

GRABOPLAST (en la urbo Győr) estas la sola fabriko de Hungario, kiu produktas kaj prilaboras artefaritan ledon.

Tiu fabriko per siaj originalaj ideoj kaj senriproĉaj produktaĵoj atingis bonan renomon en tuta Eŭropo. Oni produktis ĉi tie el artefarita ledo — eĉ vespersolenan robon . . .

Ĉu vi divenus, ke tiu robo estas el — artefarita ledo?

HUNGARA DOLĈAJINDUSTRIA ENTREPRENO
ROMOS ízű
CITROMOS ízű
KÁVÉ
magyar édesipar

REVUO DE REVUOJ

Ĉesigu angligon! Aŭ Usonigon — de la popularmuzika kulturo. Tiel sonas la slogano de Nederlanda kulturligo, kiu postulas egalrangecon (ĉu minimume?) al nacilingvaj kanzonoj. Tiuj apenaŭ havas en multaj landoj ŝancojn ĉe radio-tv, pro la senkritike akceptata, eĉ snobe preferata Usonangla hegemonio. Flandro skribas en KONTAKTO kiel ŝtataj elsendstacioj per ofta ripetado apogas la multnacian entreprenojn vendi milionojn da siaj furoraj (furorigitaj) diskoj. La ligo luktas kontraŭ la ataka fuŝ-angligo, pere de subskribkampanjo volas leĝon, kiu defendos la *rajtojn de la nacia lingvo* en la relative eta patrolando...

Ne malgrava sfero de la vivo, kvankam ankaŭ aliaj estas simile penetrataj de la Usonigo. Laŭ mia kono en nia lando ne sukcesis la superangligo de la muziko — kvankam premegas per la preparata modovento. Sed mankas por ĝi la aparta profitintereso de la enlandaj entreprenoj. Montriĝas praktika celo por E-junulrondoj, lanĉi patriotan kampanjon favore al la minacata gepatra lingvo!

Dum en tiu vasta tereno ŝajne mankas la necesa *psikologia rezisto* kontraŭ la degenera Usonangla kantlingvo, al Esperanto *tio* ne mankas ĉe multaj! En kapoj rezistas infaneca defendmekanismo kontraŭ la *minaco de Eo*, kion teorie priskribas Claude *Piron* (klód) en ESPERANTO, kaj pli larĝe en HEROLDO. Nia paca Esperanto ja minacas, ekzemple privilegiojn de nacioj kaj elituloj, interesojn de ŝovinistoj kaj kontraŭinternaciistoj, de ne-pacemuloj (da kiuj estas pli ol oni kutime imagas). Kaj novedenove la ĉefa psika kontraŭstaro sindefenda: „estas *nekredebla*..., tiam Esperanto devus esti ia *miraklo!*" Eble groteske mi riskas la opinion, ke malbonŝance, Eo kaj ĝia tuta ekzisto vere estas ia miraklo, do *ili* estas ŝajne pravaj... Sed mirakloj estis ankaŭ la interkontinentaj telefonadoj, la hejmen portitaj, televiditaj aŭtokonkuroj kaj eksterlandaj piedpilkmatĉoj, la daŭraj restadoj en la kosmo, la aŭtomobiladoj sur la Luno, ktp. Ne multaj kredis ilin eblaj...

Pli stimula informo legiĝas en eta Italia gazeto, *Voĉo de Centro Esp. Piceno:* en urbeto Teramo surpriza nombro, 230 geinstruistoj lernas nian lingvon de Lina *Gabrielli*, ĵurnalisto kaj poeto. Kaj ankoraŭ unu nekutima esprimado de la novicoj: multe pli ol vojaĝaj utiloj kaj similaj, ilin *pli efike tuŝis la ideoj* ligataj al la Internacia Lingvo, esprimitaj en E-poemoj, i. a. en nia himno, La espero, verkita de Zamenhof. De longe mi ne legis pri tiel intimsenta altiro de Eo.

S-ano *Al-Amily* skribis el Bagdado rimarkindajn ĝustigojn en SENNACIULO pri misimagoj koncerne la araban lingvon, ties komunlingvan rolon en la t. n. Oriento. En plena akordo kun la demokrata idearo, kun niaj kongresaj rezolucioj, la aŭtoro elpaŝis firme kontraŭ la pli-malpli kaŝita sento de la Eŭropeca, „blanka" supereco.

Korŝire estis legi pri la centmilionoj (!) da *infanlaboristoj* de 5—13 jaroj en la t. n. „libera" mondo, same en SENNACIULO. En la evolulandoj, ĝentile nomite, malsataj infanoj laborantaj ofte 12—14 horojn tage..., kiel ankoraŭ en la jarcentoj 18 kaj 19 en Eŭropo. Kulpas same la profitavido de la kapitalo, nuntempe de gigantaj multnaciaj kompanioj, kaj ne estas malfacile kompreni, kion la aŭtoro substrekis: la sklavigo de infanoj rekte rilatas al la kresko de senlaboreco, de atencoj kontraŭ la rajtoj de salajruloj en la okcidenta mondparto.

Certe ŝerce glosis „Red.": kie restis indikoj pri infanlaboristoj en la *mal*libera mondo? Kompreneble *li* scias bone, ke tiu mizera fiaĵo povas ekzisti nur tie, kie kapitalo *rajtas libere* ekspluati, en mondo *libera POR la kapitalo*. Estas do iel kompreneble, kial la landojn, kiuj estas *liberaj DE la kapitalo*, burĝaj politikistoj kaj ĵurnalistoj titolas *mal*liberaj. Ĉu maldekstrula gazeto forgesas pri la ruzaĵoj de la burĝa klasbatalo?

En la bele burĝonanta SEKSO KAJ EGALECO Werner *Bormann* rajte meditas pri nia seksisma, t. e. virfavora lingvouzo. Heredite de pasintaj socioj, en la lingvo ŝtoniĝis iama socia konduto, moralo, kutimaro. Eo, kiu devenis de naciaj lingvoj, laŭregule alprenis por si la jarmilan diskriminacion inter virhomo kaj inhomo (por ke almenaŭ nun mi ne uzu post *viro* inseksigan sufikson). Oni devas konsenti pri la laŭeble sendiskriminacia lingvouzo, laŭ propono de W. Bormann: sen nepra neceso ne apliki distingan vorton aŭ sufikson, kaj ne atribui al pronomo *li* ambaŭseksan sencon. Okaze oni menciu *li kaj ŝi*, aŭ simile: prezidanto ne estas nepre viro, ĉu ne? Sed *ŝi* estas ankaŭ prezidanto, doktoro, profesoro ktp., la forta sekso ja malhavas apartan sufikson en Eo, samkiel en multaj lingvoj; ja estas lingvoj en kiuj troviĝas virseksa sufikso.

Ankaŭ ene de la lingvo necesas kontraŭlukti la malegalecon, kiel cetere ĉie. Ankaŭ en la socialismaj landoj — kvankam jam tre multe estis atingita tiurilate — restis ankoraŭ en diversaj sociaj sferoj sufiĉe da farendaĵoj, precipe en la malrapide modifemaj kapoj.

Ĝuste pro tio mi trovis ne tre sukcesa en MONDA KARUSELO la seksspiradon de Reto Rossetti. Lia felietono troviĝis post la *lasta intervjuo de Kálmán Kalocsay*, kaj, kaj... nu, ni lasu la diferencon. Elinter la spritaj, parte ankaŭ raciaj paroj kaj komparoj de Rossetti pri la sekse determineblaj diferencoj konkludiĝis io jam antaŭe inkluzivita, nome ke la virino estas estulo *pli* supera... Konsentite, faligi la miton de vira supereco, gravas, la *falokratio* ankoraŭ multlande (multtavole?) ekzistas. Al la komparoj eblas ankoraŭ multajn aldoni virinfavore, sed ankaŭ multo troveblas virfavore — kaj tiam oni ekpesadus pri la opaj trajtoj, sed kiucele? Mi preferas: oni restu senjuĝe ĉe la simpla, sed stabila konstato, ke la specio HOMO *dividiĝas* je viroj kaj virinoj, alie: je virinoj kaj viroj. Vi konsentos verŝajne.

Ervin *Fenyvesi*

„Mi, ribela, Liberon deziras..."

Pri la cefa trajto de la Esperanta poezio

Kial ĝuste Esperanto akiris en la socio relativan sukceson? (Nome, ke ĝin iom granda grupo da homoj praktikas esence en la tuta mondo.) Ĉar evidentas: multaj aliaj lingvoprojektoj estis kaj estas (eble estos!) almenaŭ same bonaj-taŭgaj, kiel ĝi.

Alia demando: kial en la internacia lingvo ekzistas literaturo, pli ĝuste originala beletro, eĉ poezio? Ĉu iu t. n. „artefarita" lingvo entute *rajtas* havi tion? Ĉu povas ekzisti junulo — oni demandadas — kiu amindumas per Esperantlingvaj poemoj?

Tiuj du demandoj estas la elirpunktoj de la sekva pensoĉeno. Mia celo estas: komprenigi, kio estas la kialo, ke nome Esperanto kaptis adeptojn en la tuta mondo kaj ne aliaj projektoj, kial tiu lingva movado devas havi artan esprimilon, krome kio estas la ĉefa karakterizo de la Esperanta poezio.

Attila József diris: „Ne estas bezone, ke mi verku poemon, sed ŝajnas, estas bezone, ke estu verkata poemo, alikaze kurbiĝus la mondakso diamanta".

Por pli bone kompreni tiun ĉi vere belan frazon, oni ekskursu iom al la buntaj kampoj de la filozofio.

Kvar jarojn antaŭ la Komunista Manifesto, en 1844 Marx eklaboris pri la kritiko de la politika ekonomio klasika. Tiu laboro daŭris poste dum lia tuta vivo kaj nomiĝas hodiaŭ „Kapitalo". Sed la unuaj manuskriptoj ne eniris en sia originala formo en la pretan verkon. Ili estis eldonitaj nur en la komenco de la 30-aj jaroj de nia jarcento. Tiuj manuskriptoj estas ĝenerale nomataj „Parizaj" aŭ „Ekonomiaj-Filozofiaj". En ili Marx — utiligante akirajojn de aliaj filozofoj, ĉefe tiujn de Hegel kaj Feuerbach — traktas la temon „fremdiĝo", kiun li cetere tuŝas ankaŭ en aliaj verkoj, faritaj iom antaŭe kaj iom poste. Temas pri multflanka fenomeno, havanta radikojn en la klashava socio, nome ke la homo — unuavice la proleto — estas senigata disde la produkto de sia laboro (alivorte: ekspluatata), en la laboro fartas malbone, malkomforte; la homo ĝenerale spertas, ke li ne estas libera, sed ludilo de por li nekompreneblaj, de li nekontroleblaj fortoj, antaŭ li ĉiam staras baroj; kaj sentas sin fine ne homo, sed ĉu proleto aŭ burĝo, ĉu hungaro aŭ belgo aŭ ruso, ĉu blankulo aŭ negro, ĉu katoliko, kristano aŭ judo, ĉu ĉarpentisto aŭ poeto ktp. Li sekve de tio devas ludi rolojn, eĉ ofte kelkajn kontraŭajn.

Tiu mallibero, tiu perditeco de la homaro laŭ la aserto de Marx nature naskas la religion, kie la homo *unue:* konsentas, ke li estas en la mano de nekontroleblaj — „supernaturaj" — fortoj, due: pere de preĝoj, obeo al la ordonoj de la religio ktp. li volas kaj strebas influi tiujn por li nekontroleblajn fortojn, do liberiĝi el la katenoj de la fremdeco. Jen kion signifas la Marksaj vortoj, laŭ kiuj la „mizero *religia* estas *esprimado* de la mizero reala kaj samtempe *protesto* kontraŭ la reala mizero".

„Kian rilaton tiu ĉi ekskurso spirita havas al nia temo?" — demandus iu. Mi respondus: „Grandan".

Se oni el tiu ĉi vidpunkto analizas la vortojn de la himno de nia movado „La Espero", oni trovas surprize precizan priskribon de la fenomeno nomita „fremdiĝo":

> Forte staras muroj de miljaroj
> Inter la popoloj dividitaj...

...Kaj la sekvaj vortoj jam aludas tion, kio strikte koncernas nian temon:

> Sed dissaltos la obstinaj baroj
> Per la sankfa amo disbatitaj...

Do ankaŭ ĉi tie, kiel en la religio — precipe en la kristana — aperas la AMO, kiu devas venki la monstrajn barojn de la fremdiĝinta mondo.

Kaj nun ni devas trakti tiklan temon, nome tiun de la tiel nomata „interna ideo". D-ro Zamenhof en sia fama letero al iu Nikolaj Borovko skribis: „Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno (en Rusujo). (...) En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj. Ĉiu el tiuj elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie impresiĝema naturo sentas la multpezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis min kiel idealiston: oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas; ekzistas sole Rusoj, Poloj, Germanoj, Hebreoj k. t. p. (...) Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la „grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos ĉi tiun malbonon. (...) Unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. (...) Mi ne memoras kiam, sed en ĉiu okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj." Tia estis la komenco, sekve: la *interna ideo,* tiu ĉi fifama fenomeno, objekto de multaj diskutoj kaj disputoj naskiĝis antaŭ la *intern*(aci)*a* lingvo, se oni volas fari vortludon. Tiu ĉi ideo pri la venko de la fremdiĝo estis vere *interna,* t. e. kara por la „iniciatoro" de nia movado.

Mi plene konsentas kun *Detlev Blanke,* kiu multfoje kaj multloke asertadas, ke la interna ideo ne ekzistas kaj ne povas ekzisti, ĉar lingvo ne povas enhavi ideon. Fakte, sed... La marksisma ateismo diferences disde la burĝa ne limigas sin al la demando, ĉu ekzistas Dio aŭ ne. Jam la juna Marx rimarkis: „...kiun oni imagas, tio reale ekzistas por la imaganto, tio influas lin, tiusence *ĉiuj dioj,* kaj la paganaj kaj la kristanaj havis realan ekziston. Ĉu ne regis la olda Moloĥ? Ĉu ne estis Apolono de Delphoj reala potenco en la vivo de la grekoj?" Do laŭ li iom ŝerce la problemo estas ne la sekva: „Ĉu ekzistas Dio aŭ ne?" sed la sekva: „Se ne ekzistas Dio, kial tamen li ekzistas?"

La imago de la interna ideo povas aperi esence tial, ĉar la lingvo („langue" kaj „parole") estas universala fenomeno, nedisigebla disde ĉiu socia fenomeno, kunligebla kaj kunligata kun ili. Do por la ĉiutaga konscio la lingvo aperas kune kun tiuj, kiuj ĝin parolas kaj kune kun tiuj enhavoj, kiujn ĝi peras. Do la *interna* enhavo de la idiomoj *naciaj* laŭ tiu logiko estas la nacieco, sekve la enhavo de ajna lingvo *internacia* devas esti la *internacieco.* Tiun ĉi logikon, kiu en la fino de la 19-a jarcento, kiam en la lingvistiko regis la psikologismo, eĉ ne estis anakronisma, ŝajnis pruvi la sperto de la Esperanto-movado, ĉar ĝia interna enhavo *(interno)* fariĝis la *internacieco.* La partoprenintoj de la Esperanto-movado fariĝis internaciistoj nature ne tial, ĉar ili „ekhavis la spiriton de la lingvo", sed ili fariĝis tiaj, ĉar pere de la partopreno en la movado ili ribelis kontraŭ la fremdiĝo, kaj la spertoj, akiritaj enmovade, helpis ilin fariĝi tiaj (laŭ la leĝoj de la dialektiko). Sed la fakto, ke nek la lingvo, nek ĝia movado povas ekzisti (almenaŭ nun) aparte, ŝajnas pruvi, ke Esperanto mem havas interfratigan forton, ke ĝi posedas „internan ideon".

„Kiel rilatas tio al nia temo?" — mi aŭdas la demandon. Mi respondas: ‚Treeĝe". Ĉar el la diritaj estas tuj kompreneble, ke ne la lingvo Esperanto, sed la movado de ĝiaj adeptoj havas multan komunan kun la

religioj — same estas produkto de la fremdiĝo kaj protesto kontraŭfremdiĝa —, do ĝi tute nature ligiĝis komence al religio, kompreneble „internacia", t. e. ekumenisma, la tiel nomata homaranismo aŭ hilelismo, iniciatita de Zamenhof mem. Tiu kontraŭfremdiĝa sinteno komprenigas ankaŭ la relativan sukceson de la Esperanto-movado, ĉar ĝi donis eblon al homoj, suferantaj pro la fremdiĝo, liberiĝi disde ĝi, almenaŭ parte.

Aliflanke tute nature tiu ĉi movado ligiĝis al la literaturo, precipe poezio kaj al la artoj ĝenerale. Ĉar ankaŭ la arto, inkluzive la poezio, estas ribelo kontraŭfremdiĝa. „La poezio estas eksperimento pri solvado por la homo, — diris Attila József. — Kio ne sukcesis en la realo, en la kulturo aŭ en la naturo tion li solvas en la poezio, tie li tion realigas. La poezio estas *la naturo iĝinta superflua, sed kiu kiel superfluaĵo fariĝis denove necesa*". Por pli bone kompreni la lastan, dense dialektikan penson: la poezio *fakte nenion solvas*, sed ĝi ĝuste tie *aperas, kie la solvo estas necesa*, sed malfacila, eble preskaŭ senperspektiva. Ĝi influas la homojn pere de formigo de la ĥaosa realo, ŝanĝi (eĉ se nur iom) ilian menson kaj tiel helpas (eĉ se nur mense aŭ perspektive) venki „la obstinajn barojn" de la mondo.

Kaj ĵus ni alvenis. Mi havas malnovan diskuton kun du amikoj. Unu el ili diras: „Miraklo estis, ke aperis Esperanta literaturo". La alia ne komprenas la specifon de la Esperanta literaturo originala. Al li ŝajnas, ke ĝi kreis nenion eminentan. Al la unua mi respondus, ke laŭ la diritaj estus la miraklo, se la Esperanta literaturo ne naskiĝus. Do, la malnova ŝerco ofte citita „Ĉu vi lernas Esperanton tri semajnojn? Montru viajn poemojn!" estas esence filozofia. Al la alia post la konceptitaj pensoj dirus: ne ekzistas literaturo de la mondo krom la Esperanta, kiu tiel *klare kaj pure montrus* la fenomenon de la fremdiĝo kaj la ribelon kontraŭ ĝi.

Ĝuste tial, ke ĝi de la horizonto de internacia movado universala — ĉar la lingvo estas fenomeno universale kunligebla kun ĉio — pli akre sentas la malbenojn de la fremdiĝo. Krome, la movado donas, eĉ se limigitan, tamen solvo-modelon al tiu problemaro. En tiu sfero la homo povas liberigi sin disde la katenoj de la fremdiĝo. „... por mi Esperanto ne estas fremda lingvo, — diras W. Auld —, Esperanto estas mia propra lingvo, ĉar mi elektis ĝin. La anglan mi lernis hazarde, ĉar hazarde miaj gepatroj loĝis en Britujo kaj estas britoj ... Sed mi *elektis* Esperanton. Do ĝi ne estas fremda lingvo, ĝi estas mia dua *aŭ alia* lingvo, paralele kun la nacia lingvo." Eĉ la vortoj eksonis: *„por mi ne estas fremda"*. Jen la *eldirita sekreto de la esperantismo*. Ĝi estas *ribelo* kaj samtempe *libero* (eĉ se limigita) kaj tio naskas la esencan kontraŭfremdiĝan enhavon de la Esperanta literaturo, tio estas la *ĉeftemo de la Esperanta poezio*.

Ie ajn oni malfermas la volumojn de Esperantaj lirikistoj aŭ la antologiojn, oni trovas versojn esprimantajn ĉu suferon profremdiĝan, ĉu ribelon kontraŭ tiu monstra fenomeno:

Ĉiuflanke gardadas min muroj,
min muroj — obturoj ĉirkaŭas,
ĉirkaŭas, moviĝon kontraŭas,
kontraŭas kun pezaj murmuroj.
Ĉiuflanke gardadas min muroj.

Mi kun koro ribela deziras,
deziras, sopiras Liberon,
Liberon, purigan aeron,
aeron ... Premite mi spiras ...
Mi ribela Liberon deziras.

(Mihalski)

Silento, solo kaj vespero:
triopa trista gard'.
Ve, vane serĉas ion, iun
post montoj la rigard'.

● ● ● ●

Jen nokton krias ie la
horloĝ' kukola,
dolor' ekveas en la kor',
ĉar sola.

(Tárkony)

Denaske iĝis mi hungaro,
sed same povus esti polo.
La tutamonda proletaro —
jen mia lando, mia skolo!

Mi volas esti homo nura,
libera de la rudimentoj,
en kiu brulas flame pura
fratamo al la homaj gentoj.

(Baranyai)

Mi vin ne konas, panjo,
jen la vero! —
kiel mi konu? Ni neniun konas;
aliajn homojn mire ni spionas,
sed ne penetras colon tra
l' ekstero:
eraras, ĉu ni punas,
ĉu pardonas.

Eĉ vi ekzistas kvazaŭ
sur Venuso.
Ni estas fremdaj,
kvankam plej proksimaj.
Kion vi scias, kara,
pri l' intimaj
sentoj de mia viva
flus-malfluso?
Aŭ mi pri viaj pensoj
senesprimaj?

(Auld)

Eblus citi ankoraŭ multajn eltiraĵojn similajn. En ili aperas la menciita akra, forta kontraŭfremdiĝa sinteno de la Esperanta poezio, kiu estas laŭ mi *ĝia plej grava estetikaĵo, ĝia patoso*.

El tiu vidpunkto aparte interesa estas la poemo *Aliĝilo* de Marjorie Boulton, kiu formas ian mini-enciklopedieton de la temo „fremdiĝo". Irante de punkto al punkto en demandolisto, la poetino denove kaj denove *devas* senti sian fremdecon, denove kaj denove protestas kontraŭ ĝi, postulante veran liberon, homan:

Kion mi faru pri la aliĝilo —
blanka kaj nigra, sen vivanta
brilo?

Nomo: ne scias mi;
mi estas homo
kun multaj memoj
kaj nenia nomo.

Adreso: eble mia eĉ ankoraŭ
kaj por eterno estas simple:
Morgaŭ.

Aĝo: eterno eble je la lundo,
kaj je la mardo,
eble nur sekundo.

Metio: serĉi veron kaj ne trovi,
taŭzita, lasi venton min
trablovi.

Sekso: virino vira, ina viro,
mi diru, eble, dama kavaliro.

Nacio: homo. Ĉu mi ŝajnas
besto?
Hejmo: la nuna loko de ĉeesto.

Kaj *religio:* amo, kreo, vero,
kaj akceptita devo de espero.

Kaŝnomoj: mi ne havas;
por la taskoj
de la poeto, tuj naskiĝas
maskoj.

Sanstato: havas mi moderan
forton,
sed certe, iam, mi atingos
morton.

Unu animo homa preter scio.
Ni diru ke mi estas mi. Jen ĉio.

Se oni iom konas la Esperanto-literaturon, oni scias: ne povas ekzisti Esperanta verkisto, precipe poeto, ne konceptinta, -anta, -onta (eĉ kelkfoje) sian rilaton al Esperanto. La kialo estas, ke ĝi (la movado kaj la lingvo) al ili estas simbolo de la *homeco*, tiu de la *homa unueco*, t. e. tiu de la kontraŭfremdiĝa *ribelo*, tiu de la reala *libero*. En la menciitaj verkoj la movado kaj ĝia lingvo aperas modelo de la senfremdiĝa socio, kiu laŭ Marx estos „... produkto de libere kunigintaj homoj kaj staros sub ilia konscia, planita kontrolo", kiel tion esprimas Kalocsay en sia odo al UEA el la jaro 1938:

Simbol' de ĉiuhoma societo
ne disŝirita rase, gente, sekte,
sed kunvivante bene, en kvieto,
kaj sin servanta helpe
kaj protekte!
Ho ne ŝiriĝu tiu paca reto,
per kiu ĝi la mondon ligas
plekte!
En la diluv' minaca de la tero,
ĝi estu la insulo de l' Espero!

Péter András *Rados*

BUDAPESTO, LA URBO DE BANEJOJ

D-ro Ferenc László

VI.

La prezento de la Budapeŝtaj banejoj ne estus kompleta, se ni flankenlasus kelkajn banejojn kun plaĝo, da kiuj troviĝas nombraj en la ĉefurbo. Kiu la someron pasigas en Budapeŝto, kaj dum varmegaj tagoj volas sin refreŝigi en plaĝo, trovos tre facile la konvenan por sia gusto. En la suba artikolo ni prezentos kelkajn el la plaĝaj banejoj.

Banejo Palatinus

Unue ni vizitu la plaĝon de la Banejo Palatinus sur la admirinda *Insulo Margit*, la preferata celo de la akvon ŝatantoj. La ondoj de la Danubo, jam trafluintaj plurajn landojn, impone ruliĝas preter la banejo, de kiu nur

Banejo Palatinus — la granda baseno

Banejo Palatinus — parto de la plaĝo

mallarĝa digo apartigas ilin. La plej granda kaj plej ŝatata plaĝo de Budapeŝto povas fieri — krom sia Danubo-najbaro — ankaŭ pri la apuda mirinda Rozoparko, tiu ĉarmega ornamo de la insulo. La tre zorge kaj fakscie aranĝita parko en la banejo cetere ankaŭ plaĉe akordas kun la valora vegetaĵo de la insulo.

La popularecon de la Palatinus — malfermata ekde majo ĝis septembro — bone pruvas, ke dum varmaj semajnfinoj la nombro de vizitantoj atingas ofte la 20 milojn. Tiun egan homamason povas teman akcepti la vasta, pli ol dek-hektara areo de la banejo.

La Palatinus estas tre facile atingebla kaj de Buda, kaj de Peŝt, pere de la *ponto Margit* aŭ per la plej granda ponto, la *Árpád*. Se iu emas marŝi ĝis la banejo, ĝuos agrablan promenadon krom la bana refreŝiĝo.

La multaj servoj de la banejo kontentigas ĉiun generacion, inkluzive la infanojn. Inter aliaj ankaŭ tio kontribuas al la granda populareco de Palatinus. Kiu jam pasigis tie agrablan tagon, volonte revenas al la ŝatata plaĝo de la Budapeŝtanoj.

En la Palatinus 4 basenoj — granda, varmakva, porinfana kaj terapia — troviĝas je dispono de la vizitantoj. Eble la terapia baseno estas inter ili la plej preferata: ĝia surfaco estas 2000 m², la volumeno 1400 m³. Estas rimarkinda la akvo-enfluo: meze de la baseno el vertikala tubo altenŝprucanta akvo ŝajnigas suprenvenantan fonton.

La granda baseno ĉe la plaĝo, la plej granda en la tuta lando, estas 118 m longa kaj 43 m larĝa, kun 5074 m² da surfaco, kaj provizata per akvo tra kvin aperturoj.

La baseno antaŭ la enireja konstruaĵo estas ankaŭ ornamita baseno kun fontano. Plezure aspektas la abunda akvo falanta desur ŝtontelero, kaj la efikon kreskigas ankoraŭ ok internen direktitaj akvoradioj. Alia baseno 50 m longa, instalita per ondiganta maŝinaro, havas grandan altirforton, pro la kreataj „maraj" ondoj.

La basenojn oni plenigas laŭdestine per varma kaj malvarma akvo. La varmakvon provizas apartaj duktoj el tri putoj, boritaj en la nordo de la insulo. Ties termoakvoj — diversvarmaj — kemie estas kalcia-magnezia-hidrokarbonataj kun natrio kaj sulfato.

La termoakva bezono ĝenerale

estas 6—10 mil m³, kaj da malvarma akvo la banejo uzas ĉiutage 4—7 mil m³. La terapia baseno ricevas termoakvon el la puto N° I sen almiksado. Ĝi estas ĉiutage malplenigata. La granda baseno estas plenigata per miksita akvo, same la ond-baseno kvankam iom pli varme. La base no de la ŝprucfontano ricevas ankaŭ pli da varma akvo. La granda baseno repleniĝas ĉiun duan tagon, la ceteraj ricevas freŝan akvon ĉiutage.

Por vestiĝi, atendas la banantojn 4 mil ŝrankoj, 3800 vesthokoj, kaj 550 kajutoj. Tiuj vestiĝejoj samtempe servas por dekmil gastoj. La domo estas tiel konstruita, ke la trafiko de la vestiĝintoj kaj de la senvestiĝintoj apenaŭ kroĉiĝas, por eviti tumulton.

Ne mankas en Palatinus la tieeston agrabligantaj diversaj servoj: frizisto, pedikuro, masaĝo, oleado, bufedoj, aŭtomataj ludiloj, por ne laste mencii la restoracion. 70 duŝoj, en kaj ekster fermita ejo, 21 piedlaviloj kaj 13 trinkputoj kompletigas la instalaĵojn de tiu granda plaĝo.

Banejo Palatinus — en la baseno de ondado

Banejo Romia

En banejoj, naĝejoj, plaĝoj ankaŭ la ĉirkaŭaĵo influas la bonfarton de la banantoj. Tio estas konsiderinda grava kondiĉo ĉe instalo de nova banejo. Tiu kondiĉo taŭge manifestiĝis ĉe kreo de la Banejo Romia. Tie ĉi la ĉirkaŭaĵo, riĉe dotita per naturbelecoj, faras tre agrabla la ĉeeston por miloj da banantoj.

La 5 hektarojn vasta banejo apud la Danubo havas vere antikvan historion. Laŭ esploroj de arkeologoj kaj historiistoj, la 22 C gradan akvon de la tieaj fontoj, jam la romianoj utiligis, kondukinte ĝin al urbo Aquincum. Ili konstruis altnivelan akvoduktaron, kiel pruvas ankaŭ trovitaĵoj de nunaj elfosadoj: konstruante oni trovis en bona stato ligno- kaj ŝtonkanalojn de

akvoduktoj. Parto de tiuj relikvoj romiaj estas nun enigita en la arkitektaĵo de la banejo.

El trafika vidpunkto la banejo situas favore. La aliro eĉ plifaciliĝis post la modernigo de la ŝoseo gvidanta al urbo Szentendre, norden de Buda.

Post la renovigoj la Banejo Romia estas unu el la plej modernaj plaĝaj banejoj de la ĉefurbo. La ciferoj pruvas, ke ĝia popularеco kreskas. De majo ĝis septembro ĝin vizitas ĉiutage ĉ. 1500 banantoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ loĝantoj de la najbara kempingo.



Banejo Palatinus — varmakva baseno

En la banejo tri basenoj atendas la vizitantojn. La 33 1/3 m longa naĝbaseno kovras 620 m² per 900 m³ da akvo. La granda baseno, formanta longigitan malregulan kvinangulon, havas 1400 m² da surfaco kaj 1500 m³ da akvovolumeno. Ĝia profundo ŝanĝiĝas de 0,65 m ĝis 1,40 m. Unu lateron, 21 m longan, borderas ŝtupoj. Nenaĝantoj kaj la maljunaj preferas tiun basenon.

La infan-baseno, destinita por 3—5 jaruloj, laŭgrade „profundiĝas" ĝis 45 cm, kaj etendiĝas je 250 m² kun akvovolumeno de 62 m³. La milda deklivo de la baseno estas kovrita per ne-glita kalkoŝtono.

La basenojn provizas per akvo sep fontoj, kiuj ricevis pere de betonringoj putformajn kaptilojn. Ili eligas ĉiuminute po 700—1000 litrojn da akvo, la taga debito sumas ĉ. 10—11 mil m³, per kio la basenoj estas ĉiutage plenigataj konforme al la vizitado.

En la banejo kajutoj, ŝrankoj kaj vesthokoj servas por la gastoj, krome duŝejoj, ambulatorio kaj konvenaj manĝeblecoj, kiuj igas pli agrabla la pitoreskan

Banejo Palatinus — la vestiĝejo antaŭ la granda baseno



Banejo Romia — la parko



Banejo Romia — la naĝbaseno

plaĝon por la refreŝiĝon dezirantoj.

Banejo Csillaghegy

Ne malproksime al la Banejo Romia troviĝas la plaĝa Banejo Csillaghegy („Stelmonto"), sur deklivo de la samnoma monteto. La du banejoj kvazaŭ apude ekzistantaj „bonaj fratoj" konkursante klopodas prezenti al siaj vizitantoj pli kaj pli da ĝuo kaj ĝojo al la senzorgaj horoj de refreŝiĝo.

Sur la plaĝo de Csillaghegy alternas dense plantitaj arbaretoj kaj teras-areoj por sunbanado. La banejo cetere distingiĝas inter la Budapeŝtaj plaĝoj ankaŭ per sia varia, malplata reliefo. kaj tio faris ĝin aparte ŝatata de la publiko. La 4,8 hektarojn ampleksantan banejon vizitas multaj el eksterlando, el kiuj la regule revenantaj gastoj preferas la surloke funkciantan banhotelon.

La banejo estas facile alirebla, samkiel la Banejo Romia. La veturo de la Ponto Margit daŭras per aŭtobuso aŭ antaŭurba fervojo nur 20—25 minutojn. Alvenantoj per aŭto trovas parkejon antaŭ la baneja enirejo.

La Banejo Csillaghegy fieras per simila pasinto kiel la Banejo Romia, kion klarigas la tie ĉi troveblaj varmetaj fontoj, 22—23 C gradaj. Laŭ postrestintaj priskriboj tiuj fontakvoj estis diverscele utiligataj, interalie la forfluinta akvo movis muelilon. Ties iama konstruaĵo, nun kun alia celo, estas ankoraŭ videbla en la banejo.

Tri basenoj troviĝas en la banejo, el kiuj la norda estas 43 m longa, kaj situas romantike sub la deklivo kovrita per densa arbareto. Sub 516 m² surfaco ĝi

Banejo Romia — alirejo al la supra vestiĝejo

ampleksas 714 m³ da akvo. Du larĝaj kaj altaj ŝtupoj preteras la ĉemontan flankon, la opona flanko estas vertikala, kaj la tutan nordan lateron okupas vicoj de ŝtupoj, elegante arkantaj antaŭ la meza statuo. La profundo de l'akvo en iu parto atingas la 2,40 m-jn, kio ebligas kapsaltojn el la plonĝoturo. Multaj gastoj ĝuste pro tiu ebleco vizitas la banejon.

Alia baseno troviĝas maldekstre de la enirejo: la tn. iama ond-baseno, ĉ. 60 m longa kaj 15 m larĝa, kun surfaco de 800 m², enhavanta 680 m³-jn. De tri lateroj ĝin borderas ŝtupoj, uzeblaj ankaŭ kiel sidbenkoj. Antaŭ la baseno ĉarma virinstatuo plezurigas.

Banejo Csillaghegy — plaĝo, akvujo por infanoj kaj somerdomoj

La tria, la naĝejo estas 50 m longa, 15 m larĝa kun 1—2,1 m profundo. Ĝia surfaco estas 750 m^2, la akvoenhavo 1070 m^3.

Ĉiam grandan plezuron kaŭzas al la etuloj (kaj al la gepatroj) la tempopasigado en la aparta lud-baseno, tute malprofunda.

Novaĵo de la banejo estas la „eta banejo", instalita antaŭ dekkvin jaroj en vilao, kun etaj basenoj. Precipe eksterlandanoj preferas ĝin, kiuj kutime emas ankaŭ loĝi apud la plaĝo en somerdomoj. En tiuj estas loko por 500 personoj somerumi.

La varmeta akvo de la ĉi tie troveblaj fontoj servas kiel bazo por la basenoj kaj duŝejoj. Tektonika linio trasekcas ja tiun lokon, kaj preter ĝi eliĝas multaj fontoj.

El kemia vidpunkto la akvo de la putoj kaj fontoj apartenas al la termoakvoj kalcia-magneziahidrokarbonataj. Tio klarigas la grandan agrablecon de la basenakvo, kiu amase altiras la vizitantojn, inter ili multajn el eksterlando.

La plaĝo akceptas 6 mil personojn samtempe. Laŭdezire oni elektas por si kajutojn aŭ vestiĝejojn kun vesthokoj. La ĉeeston krom la akvaj plezuroj agrabligas ankaŭ restoraciaj kaj aliaj servoj.

En ĉi artikolo ni povis prezenti nur kelkajn plaĝojn, kiuj dum varmega vetero faciligas tion elteni al la Budapeŝtanoj, „fuĝantaj" el la ŝtonamasego, kaj same al la ĉefurbon vizitantaj eksterlandanoj.

Krom la supre skizitaj, Budapeŝto ankoraŭ fieras pri multaj aliaj plaĝoj, indaj ankaŭ je vizito, ĉar iliaj agrablega akvo kaj modernaj servoj kapablas multe moderigi la lacecon kaj kontribui al la refreŝiĝo.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

Banejo Csillaghegy — somerdomo ĉe la plaĝo



Banejo Csillaghegy — kajutoj de la vestiĝejo



malmultekosta,
bongusta novaĵo

HOT-DOG

KOLBASO

48 Ft/kg

HÚSIPAR

LEHEL
MASTRUMA SORBA FRIDUJO

S 150 E ***

HŰTŐGÉPGYÁR
JÁSZBERÉNY

Popoldanc-ensembloj, atentu!

Ni liveras al ciuj partoj de la mondo
popolkostumojn
mane broditajn vestajojn
botojn por popoldancoj

Informojn petu ce: Entrepreno
HUNGAROFILM
1054 Budapest, Báthori u. 10.
Telefono: 127-633

Produktanta firmao: Entrepreno por
Produktado kaj Pruntado
de Maskovestoj
1052 Budapest, Bécsi u. 3-5.
Telefono: 172-018

Verse pri MEDICINO

Al la 1000-jara jubileo de Abu Ali ibn Sina (Avicenna)

Abu Ali ibn Sina posedis enciklopediajn konojn, sed li estis samtempe ankaŭ elstara lingvisto kaj poeto. Plejparte li kreis *rubajojn* (kvarlinia tipa formo de la perslingva poezio, rimata laŭ la skemo a-a-b-a). Li verkis ankaŭ plurajn *hazalojn* — tio estas ankaŭ kutima formo en orientaj poezioj, konsistanta el 10—20 versoj, el kiuj ĉiuj parnombraj versoj havas la saman rimon, dum la ceteraj versoj ne interrimiĝas. Postrestis el lia plumo ankaŭ multaj *bajtoj*, t. e. „fragmentoj", mallongaj versoj, kiuj ordinare temas pri sociaj problemoj.

En tiuj ĉi versoj oni trovas spritajn komparojn, metaforojn kaj aliajn brilajn rimedojn de arto. Tre delikataj estas la sagacaĵoj, kiujn ni renkontas en la rubajoj kaj bajtoj de la pensulo.

Ibn Sina, la granda sciencisto atingis altan majstrecon ankaŭ en la poezio.

Ho, se mi komprenus de Homo esencon!
De lia serĉado, sufero la sencon!
Eĉ noblaj polviĝas, fariĝas nenio.
Ĉu iu revenis de tie? Neniu!

(Traduko de P. Polišĉuk)

Kiel videblas, liajn pensojn okupis la plej bazaj problemoj de la homa ekzistado.

Necesas substreki, ke *ibn Sina* ne opiniis la poezion esti amuzo aŭ nura rimedo ravanta la homan menson per beleco. Li vidis ĝian grandan socian signifon. Pro tio li esprimis ankaŭ siajn sociajn, filozofiajn pensojn versoforme.

Tra vivodezerto kor' mia sin movis,
Per kvardek korsentoj nenion mi trovis,
Mil sunoj lumigis l' animon, sed vojon
Al pleja perfekto mi trovi ne povis.

(Traduko de P. Polišĉuk)

Per tiuj kaj similaj versoj la sciencisto kaj poeto esprimas la animan maltrankvilon de la homo.

Ibn Sina komparas la poezion al kuracado. Vere, kuracado donas al la homo korpan sanon, la poezio donas al li spiritajn fortojn. Konvinkita pri la potenco de vortoj, precipe pri la potenco de harmoniigitaj vortoj — la versoj —, la poeto esprimis la ĉefajn postulojn, atingojn de la tiama medicino en versoj. Tradicie oni nomas tiujn versojn *urĝuza*. Verki urĝuzaojn estas antikva kutimo en Oriento. Urĝuza-oj estis uzataj kutime por prezenti diversajn konojn. Ekzemple, oni verkis urĝuza-ojn pri poezia metriko, pri la gramatiko de la araba lingvo, pri geografiaj problemoj.

Ni scias, ke ibn Sina verkis medicinajn rekomendojn. Postrestis por ni rekomendaro, kiun li verkis por Abu Talib al-Alavi, unu el la veziroj de tiu tempo. La sciencisto, ankoraŭ kiel juna kuracisto, verse propagandis la aforismojn de Ĥakim Tajazuk.

Tiel la granda sciencisto atingis sperton en la versfarado, kaj li facile prezentis ĉiujn aspektojn de la teorio kaj praktiko de la tiutempa medicino.

Tiuj liaj verkoj plurfoje estis tradukitaj en la latinan lingvon. Estis skribitaj komentoj al la verko, kaj ne nur en Oriento, sed ankaŭ en Okcidento ĝi estis uzata kune kun aliaj atentindaj verkoj en la universitata instruado. Ankaŭ al tio ŝuldiĝas, ke pli ol 40 ĝiaj kopioj konserviĝis en la bibliotekoj de la mondo.

La plej granda honoro por ibn Sina estas tio, ke pluraj reguloj kaj pensoj, esprimitaj en liaj verkoj, restas ĝis nun validaj en la profilaktiko.

Soislom Somuĥamedov,
doktoro de filologio,
laŭreato de Firdaŭsi-premio

Konsoli au stimuli?

„Ni estas junaj; kiel en ĉiuj lingvoj, unue la poezio floras kaj poste la prozo, romano. Laŭ mi, ni estas tro proksime al la komencaj jaroj por havi tre altvalorajn prozverkojn."

„Nia Esperanta literaturo ne estas ankoraŭ tiom evoluinta, ke ni povu apliki al ĉiuj verkoj la plej severan mezuron de kritiko."

Du konstatoj. Ĉu alibio por la Esperantaj verkistoj kaj samtempe deadmono por la tro rigoraj kritikistoj de iliaj verkoj? Se jes, tiam oni povus ankoraŭ longe, sufiĉe longe neglekti la pli severan „mezuron" kaj same trankvile atendi la venon de la „valoraj" verkoj. Nek unu el la cititaj eldiroj precizigas, kiam propre estas venonta la tempo por finfine konsekvence trakti literaturon, speciale la prozon en la Lingvo Internacia, kvankam la unua portas la daton 1959 kaj ties aŭtoro estas G. Waringhien, dume la alia aperis jam antaŭ duonjarcento en Literatura Mondo!

Habent sua fata libelli, kiel diras la latinistoj, ĉar jam antaŭ kvindek jaroj almenaŭ unu libro asertis, ke similan konsolon la Esperanta literaturo ne meritas kaj ĝia aŭtentika kritiko ne bezonas. Jen, kion diras Ludoviko Totsche-Tárkony sur la paĝoj de sia „De paĝo al paĝo" el 1932:

„Ni rekonu niajn verajn talentojn ... kontraŭe ni komprenu, ke aliaj, eble ankoraŭ modaj verkistoj jam nekontesteble apartenas al la pasinto."

Kial tiom da citaĵoj? Nur por montri denove, ke kvankam en Esperanto ekzistas verkoj pli kaj malpli valoraj, oni ne ĉiam kaj ne ĉiam konsekvence klasifikas ilin laŭ tiu ĉi

valorskalo. Ke la metro aplikata por ilia „mezurado" plejofte varias. Ke la multnombraj gazetaraj recenzoj dum jardekoj kreskigis multe da sarkaĵo atribuante — pro diversaj kaŭzoj — al multaj aŭtoroj de multaj efemeraj verkoj lokon sur Olimpo kaj al la publiko priservante plaĉan legaĵon.

Feliĉe, artajn valorojn oni ja povas nek neadi, se ili enestas, nek alsorĉi, se ili mankas. El tio rezultas la unuaranga devo de la kritiko — sed ankaŭ de la recenzistoj — scipovi distingi la valoron disde la pseŭdovaloro. Ĉar rekonadi relative malaltan nivelon speciale de la Esperanta prozverkado tute ne signifas — kaj per tio ni reobĵetas al la unua citaĵo — rezigni pri ties plialtigo aŭ hipokriti antaŭ senvaloraĵoj.

Ankoraŭfoje do ni povus apelacii al la pledo de Tárkony-Totsche el 1932. Kaj konkludi interalie, kiel dume stagnis eĉ sur la paĝoj de la respektataj literaturaj revuoj aprecado de artverkoj — kun la escepto de la Hungara Vivo, kiu traktis i. a. la problemon pri la karaktero de la Esperanta literaturo kaj de la prozo speciale.

Kiam ajn oni gloradas literaturon verkitan en Esperanto kiel fenomenon unikan en multlingva mondo, tiomfoje evidentiĝas, ke preskaŭ unusola argumento por tio estas longa vico da verkoj kaj aŭtoroj ordigitaj laŭ alfabeta ordo, ev. laŭ spontane elformitaj periodoj kaj skoloj.

Tamen tiaspeca fenomeno meritus esti difinita pli ekzakte, kio estas finfine unu el la aspektoj de la efektivigo de la planlingvo. Nepre pli ekzakte kaj pli funde ol tio okazas ekzemple en la priliteratura parto de „Esperanto en perspektivo". Ankaŭ la terminara ekipo tie aplikita malkaŝas, kiom oni ankoraŭ ŝuldas al teoria prilaboro de la temo.

Pri Esperanto el vidpunkto lingvistika estis verkitaj miloj da studaĵoj. Pri ĝia literaturo — tiu nekontesteble plej precipa manifestiĝo de la lingvo — envere nur kelkaj. Por ĝia evoluigo, por la identigo de la misio kvanto absolute nesufiĉa. Altvaloran literaturon oni ne povas simple atendi kiel Mesion, oni devas adekvate stimuli ĝin.

Oldrich *Knichal*

Bibl. notoj

Literatura Mondo, 1931

L. Tárkony—Totsche: De paĝo al paĝo, 1932

O. Kníchal: Unua kontraŭmilita romano en Esperanto, Paco 1966; Verdaj donkiĥotoj post 33 jaroj, Informoj de CSEK 1966, kultura aldono (Kritikaj artikoloj pri la verkoj de J. Baghy); Kelkaj notoj pri la literaturaj historio kaj kritiko en Esperanto, almanako Panoramo, CEA, 1976

Juhan Liiv ravis min

Juhan Liiv: Al abelujo ĝi flugas. Poemaro. Elekto kaj traduko de Hilda Dresen. Eldonis: Eesti Raamat, Tallinn, 1980. 158 p., 17 cm. Prezo por Hungario: 15,— forintoj. Gld. 4,50.

La nomo Juhan Liiv estis nova kaj nekonata por mi, sed mi scivole kaj senpacience trafoliumis lian poemaron „Al abelujo ĝi flugas", ĉar mi bone konis la nomon de la tradukistino, kiu esperantigis la versaĵojn de tiu ĉi estona poeto. La nomo de la tradukistino estas Hilda Dresen kaj ŝia poezia plumo ne unufoje ravis kaj ĝojigis min. Pere de ŝiaj melodiaj tradukoj mi penetris en la riĉan estonan poezion, al kiu poezio apartenas ankaŭ la poemoj de Juhan Liiv.

Ankoraŭ la unuaj strofoj de la poemaro de Liiv malkovris antaŭ mi delikatan, emocian mondon. J. Liiv ne verkas, li kvazaŭ pentras akvarelajn pejzaĝojn, kiujn oni ne nur aŭdas kaj vidas, sed ankaŭ profunde eksentas. Nur per kelkaj karakteraj detaloj la poeto spertas sugesti la ĉarmon de la vintra ĉielo aŭ la kvieton de la aŭtuna arbaro.

„Stelo-diamantoj,
la arĝenta lun',
la ĉiel' blu-nigra
belaj estas nun . . ."

(Vintro)

Sed la naturpoezio de Liiv ne estas memcela, ĝi vekas riĉajn asociadojn kaj sur la etaj, sed reliefaj pejzaĝoj, la poeto projekcias fortajn psikajn statojn. La poeto animigas la naturon kaj tiel talente li efikas al la pensoj kaj sentoj de la legantoj.

„La nokto flugas sen rapid',
sub arboj ombrostri',
arbeto dronis en medit' —
ĉu zorgojn havas ĝi?"

(Nebuloplena mart-maten')

La naturpoezio de Liiv estas senpere kunligita kun lia patrolando. Liiv dolore amas Estonion. Ne hazarde la titolo de la poemaro estas „Al abelujo ĝi flugas". Per unu ne nur trafa, sed brila metaforo Liiv esprimas sian senliman amon al la lando, kiu naskis lin. Simile al abelo, kiu ĉiam strebas al abelujo, ankaŭ tiel la poeto sopiras pri Estonio kaj eĉ la morto ne povas haltigi lian impetan flugadon al sia kara patrolando.

„. . . vi morton ignoras, ne vidas,
nur al patrujo rapidas!"

(Al abelujo ĝi flugas)

Ne nur la soleco, sed ankaŭ la peza vivo de lia popolo ĉagrenas Liiv, sed la poeto kredas en la hela estonteco de sia patrujo (*„Estonteco"*, *„Mia sorto"*).

La poemoj de Liiv sonas kiel obtuzaj ĝemoj aŭ kiel teneraj maĵoraj melodioj. Pere de la brila Esperantotraduko mi ekkonis kaj ekamis tiun ĉi talentan estonan poeton.

Georgi *Mihalkov*

GAJA PAGO

Ekzistas ankau tia celo!?

— Fine mi atingis mian celon. Neniam mi volis scii Esperanton, kaj jen, almenaŭ en tio mi sukcesis!

... sed ankau kompleta miscelo ...

— Oni informis min, ke en nia urbo neniu parolas la belgan kaj la svisan lingvojn. Ni decidis: ekde septembro nia filino eklernos la belgan lingvon, kaj post unu jaro ankaŭ la svislingvon, por iĝi eminenta sekretariino.

Kaj se temas pri mus-mis-celo?

Antaŭ mus-truo staras du musetoj kaj rigardas la zigzagan sed elegantan flugon de vesperto. Diras unu:

— Se mi estos granda, ankaŭ mi iĝos piloto ...

Sed ekzistas celkonsciaj ankorau

— Gesinjoroj — diris la profesoro de la urbestro-kandidatoj — hodiaŭ ni lernos, kiel oni devas *solene meti* la fundamentan ŝtonon por nova urbodomo aŭ alia instanco.

Certe precizulo

— Kial vi metis 500 horloĝojn sub la motoro? — demandis doganisto la aŭtiston.

— Nu, se mia horloĝo malfruas, *iu* tamen montros al mi la precizan tempon.

Kaj se montras normale?

— Vian sangopremon mezurante, ĝi ne plaĉas al mi — diras doktoro.

— Ĉu tro alta aŭ malalta eble?

— Normala! Sed en nia epoko *ĝuste tio* estas stranga!

Oni estu feliĉa!

— Nur de edzohava virino petu ŝian manon. Vi nenion riskas ... kaj tamen vi igos ŝin *feliĉa!*

... tamen ne tiel!

— Ilonjo kara, vi eĉ ne scias, kiel beligas vin la konjako!

— Sed Joĉjo, mi tute ne trinkis ...

— Sed mi jes ...

... eventuale tial?

Inoj parolas inter si. Iu diras:

— Kiel feliĉaj estos la nunaj knabinetoj! Ili jam ne havos surbrake cikatron de variola vakcino ...

Sincera tabulo teatra

HODIAŬ VESPERE ĈIUJ BILETOJ VENDIĜIS — en la unuaj tri vicoj.

Tute rajta fiero

— *Hejme komandas mi* — diris fiere la solvivanta olda fraŭlo.

... ankau pro vivmaniero sana

— En la urba arbareto, en freŝa aero ĉiutage 3 horojn — mi cigaredas.

Verŝajne ne esperantistino

— Mia edzino estas alte kulturita virino. Ni povas kvereli en kvin lingvoj.

Detektivromanco

— Terure!!! — ekkriis la detektivo de la magazeno ĉe la observa televidekrano — iu ĵus ŝtelis la kaŝitan kameron!

Korespondi deziras

„Mi serĉas sobre vivantan, senpasian, senhobian leteramikon por interŝanĝi etikedojn de diversaj vinoj kaj brandoj."

E. F.

Rezultoj de la literaturkonkurso „Europo"

La 1-an le Junio okazis en Milano (Italio), ĉe la sidejo de Goethe-Institut, la ceremonio de la premiado de la internacia literaturkonkurso „Eŭropo".

En la Esperantlingva branĉo la premioj estis jene asignitaj: 1-a premio al Adalberto *Hules,* 2-a premio al J. H. *Rosbach,* 3-a premio al Nicolino *Rossi.* Laŭdaj mencioj iris al Roger *Bernard* kaj A. P. *Pirandello.*

La juĝkomisionon konsistigis Giordano *Azzi,* Aldo *de' Giorgi,* Daphne *Lister,* Kris *Long* kaj *Mauro Nervi.*

Estas substrekinde, ke en la anglalingva kaj germanlingva sekcioj la unuajn premiojn gajnis respektive la esperantistoj Carmel *Mallia* kaj J. H. *Rosbach.*

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Steloj de Eger

Géza Gárdonyi

La legado de Esperanto-bildrakontoj estas ne nur amuzo, sed utila lingva perfektiĝo. Do, ni trafoliumu la belan bildrakonton „Steloj de Eger"!

1. Al kiu kaj kiam Gregoro donacis la turkan ringon?
2. Kie kaj kiam Eva trovis la plandesegnaĵon de la fortikaĵo de Eger?
3. Bonvolu daŭrigi la frazon: „Homoj, prenu armilojn! Danĝero minacas la vilaĝon! Iu fripono mensogis al la ..."

La limdato por la sendo de la respondoj estas unu monato post la apero de la revuo.

ESPERANTAJ LIBROJ EL HUNGARIO

Certe multaj niaj legantoj aŭdis jam pri la vasta eldona agado de Hungara Esperanto-Asocio, sed verŝajne ili ne ĉiuj konas ties verajn dimensiojn, nek estas orientitaj pri la opaj libroj. Sur la sekvaj paĝoj ni publikigas „mini-katalogon" de niaj libroj, kun la nekaŝita deziro veki apetiton pri ili. Ciujn subajn verkoj oni povas mendi rekte ĉe HEA (Budapest, pk. 193, H—1368), ĉe la Libroservo de UEA, aŭ ĉe aliaj libroservoj.

Enciklopedio de Esperanto, tiu ĉi elstara verko de la esperantologio, prezentas la historion de la unua heroa duonjarcento de la Esperanto-movado. Nepra konsultlibro por ĉiu serioza esperantisto.

Eldonjaro: 1980. 620 p., 24 cm. Tole bindita. Prezo: 45,— gld. ISBN 963 571 051 8.

Tiu ĉi bildrakonto prezentas al la legantoj atentokaptan historion el la 16-a jarcento, kiam Hungario estis okupita de turkoj. **Eger** estas nordhungara urbo, kie okazis decida batalo inter hungaroj kaj turkoj.

Eldonjaro: 1979. 64 p., 24 cm. Prezo: 6,— gld. ISBN 963 571 054 2.



Ses frutempajn romanojn de la klasikaj Esperantaj prozistoj **Vallienne** (1854—1908) kaj **Luyken** (1864—1940) rerakontas koncize la aŭtoro de tiu ĉi libro, aperigante specimenojn ankaŭ el la verkoj mem.

Eldonjaro: 1979. 229 p., 19 cm. Prezo: 15,— gld. ISBN 963 571 063 1.

Post **La filoj de l'ŝtonkora homo** kaj **Steloj de Eger,** jen nova bildrakonto: **La Faraono** de **Prus,** kiu fariĝis kvazaŭ Esperanta klasikaĵo. La luksa tekniko kaj la trafaj bildoj destinas tiun ĉi libron ankaŭ por komencantoj.

Eldonjaro: 1980. 44 p., 24 cm. Prezo: 4,80 gld. ISBN 963 571 069 0.

Jam en dua eldono rikoltas sukceson **Gvidlibro por supera ekzameno,** al kies sekcioj „Historio" kaj „Literaturo" aldoniĝas kial tria: „Metodiko". Libro, necesega por ĉiu movada aktivulo.

Eldonjaro: 1979. 370 p., 19 cm. Prezo: 15,— gld.





Studoj de elstaraj esperantologoj — **Blanke, Drezen, Lins, Rátkai** ktp. — ekzamenas, kiel la Esperanto-movado rilatas al la socio, en kiu ĝi ekzistas. **Socipolitikaj aspektoj...** estas nepre leginda de ĉiu, por kiu Esperanto ne estas nura amuzo.

Eldonjaro: 1978. 228 p., 19 cm. Prezo: 13,80 gld. ISBN 963 571 035 6.

Dorno estis populara esperantista verkisto inter la du mondmilitoj, sed lia kontraŭreĝa satiro kaj la Esperanto-fona krimkomedio **Levu la manojn!** ankaŭ nuntempe estas amuza legaĵo.

Eldonjaro: 1977. 140 p., 19 cm. Prezo: 12,— gld. ISBN 963 571 009 7.

El la „Verda Biblio" estas ĝislarme ridiga satiro pri la intermilita Esperanto-movado, verkita en Biblia stilo. Novajn esperantistojn orientas koncizaj, sed trafaj notoj.

Eldonjaro: 1978. 84 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 8,10 gld. ISBN 963 571 036 4.

La morto de la ĉielarko de E. Ady (1877—1919) estas kolekto de liaj belaj poemoj kaj plej pensigaj artikoloj, el kiuj lastaj unu pritraktas Esperanton. Plejparton de liaj verkoj tradukis el la hungara K. Kalocsay.

Eldonjaro: 1977. 88 p., 19 cm. Plaste bindita. Prezo: 10,80 gld. ISBN 963 571 028 1.



La aŭtoro de **La knaboj de Paŭlostrato** poste famiĝis kiel dramisto. En tiu ĉi plurfoje filmita knabromano li regalas nin kvazaŭ per proza poemo pri la fideleco al ĉio, kio estas la nia.

Eldonjaro: 1978. 182 p., 19 cm. Prezo: 13,80 gld. ISBN 963 571 039 9.

Turisma Kantaro enhavas 51 kantojn tradiciajn kaj popolajn, krome ankaŭ la plej popularajn kantojn de la Esperanto-movado. Ĉiujn kantojn akompanas muziknotoj.

Eldonjaro: 1976. 84 p., 20 cm. Prezo: 6,50 gld.

La rozo de l' sultano estas kortuŝa fabelo el la tempoj, kiam Hungario estis superregita de turkoj. Ĝiaj protagonistoj estas infanoj, kiuj fine venkas ĉiujn malfacilaĵojn.

Eldonjaro: 1980. 56 p., 14×20 cm. Dukolore ilustrita. Prezo: 7,50 gld. ISBN 963 571 042 9.

Esperanta-Kamboĝa Vortaro estas ne nur vortaro, ĝi enhavas ankaŭ la koncizan gramatikon de Esperanto, sekve ĝi bone taŭgas por memlernado. Ĝi estas la unua lernilo de Esperanto en tiu Azia idiomo.

Eldonjaro: 1976. 148 p., 20 cm. Prezo: 18,— gld.



Sciencaj Komunikaĵoj estas ĉiujaraj 80—100-paĝaj libroj kun po ĉ. deko da studoj pri matematiko, fiziko, hidrologio, medicino ktp. Ĝi haveblas depost la jaro 1976.

Prezo po: 12,— gld.

25 jaroj prezentas la kremon de la premiitaj verkoj de Belartaj Konkursoj inter 1951—1975. **54 verkoj de 56 aŭtoroj kaj tradukistoj el 20 landoj** donas fidelan momentfoton pri tiu kvaronjarcento de la Esperanta beletro.

Eldonjaro: 1977. 208 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 13,80 gld. ISBN 963 571 005 4.

Ĉiela birdo estas apoteozo de la sincera, pura amo, kiu persiste vivas ankaŭ dum la mornaj tagoj de la unua mondmilito, kaj povas elkreski eĉ en la plej eta kaj malriĉa vilaĝo.

Eldonjaro: 1979. 44 p., 20 cm. Prezo: 8,10 gld. ISBN 963 571 050 X.

La hungara porinfana poezio venas el la plumo de la plej eminentaj hungaraj poetoj, klasikaj kaj modernaj. Tiel **Hundbazaro** — kiu enhavas 33 orelravajn poemojn — fariĝis ŝatata legaĵo de infanoj kaj plenkreskuloj egale.

Eldonjaro: 1979. 68 p., 19 cm. Dukolore ilustrita. Prezo: 10,20 gld. ISBN 963 571 041 0.

Malriĉaj homoj estas verŝajne inter la plej bonaj pecoj de la mondliteraturo, priskribantaj la animdetruan efikon de la milito. Móricz prezentas al ni tion, rakontante teruran murdon, plenumatan de libertempanta soldato.

Eldonjaro: 1979. 36 p., 24 cm. Prezo: 2,40 gld. ISBN 963 571 055 0.

Dek fabelojn enhavas tiu ĉi — laŭ amplekso modesta, sed enhave tre riĉa — rapide populariĝinta libro. La fabeloj, prezentitaj de **Benedek,** estas antaŭ ĉio etikaj, kaj ili rajte kalkulas ankaŭ pri la atento de plenkreskuloj.

Eldonjaro: 1979. 70 p., 20 cm. Ilustrita. Prezo: 10,20 gld. ISBN 963 571 061 5.

133 tagoj estas kolekto de artikoloj kaj literaturaĵoj pri la historio de la unua hungara proleta ŝtato en 1919. La libro enhavas informojn ankaŭ pri la hungara Esperanto-movado de tiu epoko.

Eldonjaro: 1979. 237 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 12,— gld. ISBN 963 571 033 X.

SÁNDOR SZATHMÁRI
KAIN KAJ ABEL

Kain kaj Abel enhavas ĉiujn signifajn novelojn de la elstara esperantista prozisto, kiuj pli frue ne aperis libroforme. La novelkolekton kompletigas analiza eseo pri Szathmári, kaj bibliografio de liaj verkoj.

Eldonjaro: 1977. 288 p., 19 cm. Prezo: 16,50 gld. ISBN 963 571 006 2.

Laŭ sia originala profesio Baghy estis aktoro, tial ĉiam li donis specialan atenton al la teatro. **En maskobalo** estas kolekto de kvin legindaj unuaktaĵoj de la populara aŭtoro.

Eldonjaro: 1977. 140 p., 19 cm. Prezo: 12,— gld. ISBN 963 571 003 8.



La filoj de l' ŝtonkora homo — emociiga kaj atentoĉena romano, kies agado disvolviĝas dum la liberbatalo de hungaroj dum 1848/49 — origine estas ĉ. 500-paĝa libro, sed ankaŭ la jena bildrakonta varianto donas klaran imagon pri la verko.

Eldonjaro: 1978. 64 p., 24 cm. Prezo: 6,— gld. ISBN 963 571 038 0.

LETERKESTO

Karen Jiri, Praha, CS: La fondo de societo de espistaj literaturistoj ĉeñaj, kaj ties bravaj planoj vekis nian konsentan intereson. La laboro pri originala E-poezio, ties teorio, k. s., la emo traduki en nacian lingvon el Eo — signas ankaŭ la novajn tempojn en la E-literaturo, kiu pli kaj pli altiras naciajn poetojn, kia ankaŭ vi estas. La atendata vastiĝo de tiu literatura rondo certe baziĝas sur objektivaj faktoroj, troveblaj ĉe poetoj, verkistoj de „malgranda" lingvo. Ni aŭguras belajn sukcesojn por levi alten la ĉeñan — jam altgradan — E-literaturan movadon.

Kris Long, Brackwell, Berks. GB: Ke la hungara poezia vespero en Londono estigis grandiozaĵn impresojn en nia leganto, tion pruvis lia — tuj poste verkita — poemo (aperinta en HV nro 5/80). Pri lingva komuniko perfidas ion interesan, ke post pala traduko de poemo de Ferenc *Juhász,* en la *hungarlingva* deklamo de la poeto „la vortoj mem kantis", kvazaŭ klare interpretantaj. „Kortuŝe korskue estis aŭskulti ... ne priskribeblan deklamon" de János *Pilinszky.* Koran dankon pro la plursence interesa letero!

Göpel, Wolfgang, Wolmirstedt, GDR: Ni ĝuis la gajan „repuŝon" al la pornografion suspektanta profesoro, koncerne la p. 209 en HV nro 6/79. Sekvante vian konsilon, ni preteras la planitan demandon pri liaj etuloj, eble jam geedziĝintaj, ĉu ili estas ŝirmindaj de la „malmoralecoj" troveblaj en la *Baza Literatura Krestomatio* ... Scias diablo, sed ni restas ĉe la firma kredo, ke *amuzo* ne devas esti nepre *ammaluzo.*

Kubulnieks, Artur, Aluksne, SU-Latvio: Konsentite, ke la ĉie ajn troveblaj pruduloj estas plejparte ankaŭ truduloj — pri siaj karesitaj afektaĵoj: ni aludas al la supra respondo. Pri la senditaj elegioj krom ke ili sentigas novan aromon, ni devas ripeti la pli fruan respondon.

Anikejev, S. I., Vladivostok, SU: La E-Klubo en la ekstremorienta parto de la grandega lando ree fondiĝis nur antaŭ du jaroj. La malnova havenurbo havas longan, rimarkindan historion de E-movado: jam en la revoluciaj jaroj, eĉ dum la fremda invado en la 20-aj jaroj funkciis tie E-societo kun renomaj, bravaj esperantistoj. Inter ili estis ankaŭ Vasilij *Eroŝenko,* la blinda verkisto, kiu plurfoje skribis pri la tiea vivo (vd. en HV nro 4/80.). Ni insistas: via klubo esploru plu la antaŭulojn en la urbo „Gloro orienta" (t. e. signifo de la urbonomo).

Albinas, Kirvela, Vilnius, SU-Litovio: La Vilnjusa E-Klubo abonis 20 ekz. de HV pasintjare, sed apud la ricevitaj 5 nroj mankas al ĉiuj la nro 4/79. Bedaŭrinde ni estas jam senpovaj por ŝtopi la mankon. Kiel alifoje jam respondite, la ŝtata peranto tro malfrue mendis amason de abonoj, la presado tiam jam okazis eĉ de la 4a nro. Precipe el tiu numero bedaŭrinde ne restis sufiĉe da ekzempleroj (pro la Lucerna kongreso) por kontentigi *ĉiujn* nove venintajn abonantojn.

Nadjalkova, Nora, Izgrev, distr. Pleven, BG: Plezure ni legis vian rakonteton pri burĝoninta amo dum la *Ora Pola Aŭtuno.* (Kredeble pri tiaj estus verkebla tuta novelaro ..) Bedaŭrinde estas nur, ke ĝi tro malfrue atingis nin por la proponita numero.

Bálint István, Kecskemét, H: De nia fidela leganto ni ricevas de longaj jaroj preskaŭ regule trafajn rimarkojn pri la enhavo de HV, krome pri okazaĵoj en lia tipe hungar-ebena urbo. Estu esprimita ankaŭ ĉi tie nia amika rekono kaj danko pro lia diligenta movada agado!

Korespondi deziras

Geedzoj Janina kaj Andrzej *Malaszowski,* junaj biologiistoj pri sciencoj, kulturaj temoj k. a. PL—58—30 *Walbrzich* str. Hirszfelda 4 m 13. — F-ino Mariana G. *Gateva* (20) pri fiziko, matematiko, literaturo, belarto, muziko. BG—4199 *Trud, s.* (raj. Plovdiva). — F-ino Kalina *Konstantinova* (17) pri muziko, belarto, literaturo, lingvoj, BG—4004 *Plovdiv,* ul. Asen Halaĉev 71. — *Bajoras* Vidas (24) kinomekanikisto, ktm. pĉt. SU—234—430 *Jurbarkas* Litovujo, Upeiviu 21.

Vajda Joan (30) programisto, serioze kun gesamideanoj el okcident-eŭropaj landoj, pri turismo, filatelio, interŝ. bk, pm, afranku filatele R—2200 *Braŝov—1,* Rumanio, Cas. poŝt. 91. — F-ino Zofia *Wrawer* (25) ktm. pri turismo, arto, naturo, foto, psikologio, rec. gastado, PL—53—332 *Wroclaw,* str. Powstańców Ślaskich 105/26. — F-ino Krystyna *Zgud* (28) pri literaturo, pentroarto, montarturismo, E-movado, profesio: komputila programisto. PL—43—300 *Bielsko-Biala* ul Podgórze 16/62. — S-ro Vello *Raasman* (21) pri literaturo, foto, lingvoj hispana, angla, interŝ. diskojn de klasika k moderna muziko, SU—Estonio, *Tallinn 16,* Sihi TN 115. — Riana *Spirka* (16) lernantino, Estonio, SU—200004 *Tallinn,* Nahimovi 8—69. — Diana *Lumina* (16) lernantino, SU—200029 *Tallinn,* Mustamäe tee 165—3. — Irmela *Veersoo, Tallinn,* SU—200029, Ed. Vilde tee 70—40. — Ulle *Leis* (15) SU—200029 *Tallinn,* Ehitajate tee 52—34. — Lelo *Sokk* f-ino (15) kaj Heli *Sildmäe* f-ino (15), ambaŭ: SU—200029 *Tallinn,* Keskuse 4—44. — *Holovač* Jurij (23) fizikisto pri scienco, arto kaj turismo, Esp. aŭ angle, SU—290008 *Lvov* a/k 845. — Pupojn kun nacia kostumo interŝ. dez., kolorbk. kaj amikan korespondadon proponas prez-ino de Esp. Soc. „Georgi Stanev", Stefka *Marinova,* BG—3300, *Orjahovo,* str. Sofjiska 14. *Laŭ sama adreso* atendas korespondamikojn: f-ino Malina *Petkova* (23) kaj Venka *Petrova* (45), vicprez. Petár *Florof* (42), s-ino Zlatka *Purceva* (55), f-inoj Kapka *Dečkova* (13), Gjunaj *Ergjulova* (13), Elka *Simeonova* (13), Mariela *Cvetanova* (13), kaj Ivajlo *Basilev* lernanto (14). — Tomasz *Tyc* (22) fraŭlo, pri turismo, foto, geografio, interes. bk, certe resp. PL—03—345 *Warszawa,* str. Oginskiego 24m45. — Gestudentoj de universitato en *Vladivostok* (19—22) atendas koresp. amikojn: SU—690652, Universitata E-Klubo, str. Uborevića 25. — Kun seriozaj filatelistoj, precipe hungaroj, interŝ. unuatagajn stampitajn kovertojn, k. s., inĝ. František *Nikodem,* CS—052 01 *Spišská Nová Ves,* Partizánska 3.

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **István Fábián.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Auŕel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,— al eksterlando por unu jaro 90,— forintoj. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. — 80. — 263. — Nyírségi Nyomda Responda gvidanto: Zoltán Jáger, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

El niaj specialaj artikloj por flegado de vizaĝo kaj haroj, certe troviĝas pluraj ankaŭ sur via banĉambra breto. Nia drogejo tamen klopodas ĉiam havi por vi ion novan, ion surprizan. Niaj kunlaborantoj helpas al vi, por ke vi aĉetu kosmetikaĵojn plej konvenajn por viaj haroj kaj vizaĝhaŭto. STELLA ne celas simple nur vendi; ĝi volas vendi nur tiajn artiklojn, kies efiko respondas al viaj atendoj.

La Drogejo STELLA feliĉe vidos vin inter siaj klientoj. La vendejo estas malfermita de la 9a ĝis la 18a horo, kaj ĝi troviĝas ĉe la adreso VIII-a distrikto, strato Mező Imre 4. je kelkaj paŝoj de la placo Baross. Per subtera fervojo, per aŭtobuso ĝi estas facile atingebla, eĉ, proksime al ĝi troviĝas ankaŭ parkejo por aŭtomobiloj.

Ni volonte atendas ankaŭ vin.

STELLA

POPOLARTO ESTAS ĈIES!

Se vi serĉas valoran
kaj belan donacon,
vi trovos riĉan sortimenton
de niaj renomaj unikaj
produktaĵoj

en vendejoj de

POPOLARTA KAJ HEJMINDUSTRIA ENTREPRENO

EN 80 LOKOJ DE HUNGARIO

KÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT·

31. marc. 1981